


Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPE



HALO...
HALOOO..!
...



Antverpeno '93
Kultura Ĉefurbo de Eŭropo
speciala Esperanto-ĉieronado,
informoj dorse de la revuo



Krys Ungar kaj Emile Van Damme, du novaj talentoj en la poezia firmamento, prezentas al vi faskon da poemoj pri hodiaŭaj temoj: jen humuraj, jen pensigaj, jen malgajaj. William Auld ne hezitis citi Ungar kaj Van Damme inter la plej elstaraj poetoj nunaj.

*Krys Ungar: Meznokto metropola. 360 BEF + afranko.
Emile Van Damme: Dolçe amare. 240 BEF + afranko*

Mendu la librojn ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ ĉe via kutima libroservo.



"Stafeto"-serio prezentas

Vojaĝoj

kaj aliaj poemoj

Edwin de Kock

Poezie turismi en Eŭropo, ĉu antikva, ĉu nova. Festi la centjarigon de Esperanto. Ĝue pripensi dum momento da silento... Jen la eblecoj, kiam vi legos la poemaron de nia sud-afrika poeto. Ne timu... Notoj kaj vortlisto helpas vin tra malfacilaj partoj. La poeton mem vi povas ekkoni legante liajn biografiajn notojn. Tiu ĉi poemaro vere malfermas poezion al ĉiuj. Modele!
Vojaĝoj kaj aliaj poemoj. 148 p., 390 BEC + sendokostoj, bindita. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

SENNACIULO

Organo de


Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

kies membroj kontribuas al kreo de mondo emancipita, tolerema, sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.
Petu informojn de:
SAT, 67 av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio.

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en praktika plasta kolektilo!

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Prezo 360 BEF (inkl. afrankon). Se vi mendas 2 ekzemplerojn, vi ricevos trian senpage!

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondinto: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, elektronika poŝto: 100272.1601@compuserve.com; ĝirkonto 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anonstarifo: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipo ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj) □ represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-rajto ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NORA-F □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ MONATO ne nepre reprezentas la opinion de l' eldonejo.




Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	10
Medio	12
Scienco	13
Ekonomio	14
Lingvo	16
Libroj	19
Novelo	20
Eseo	22
Arto	24
Spirita vivo	26
Hobio	28
Enigmoj	30

Ĉu ankaŭ vi vane provis telefoni en junio al la eldonejo de MONATO kaj pensis „Ĉu tiuj uloj de FEL neniam laboras?” Nu, la uloj de FEL jes laboris, eĉ pli intense ol kutime, ĉar dum tuta semajno telefonsonorado ne ĝenis ilian laboron. Sed la nefunkcigo de la telefono eble ĝenis vin. Pro tio FEL pardonpetas, kvankam ne ĝi kulpis pro tiu miso de l' moderna mondo...

Kelkaj ruzuloj tamen venis al la ideo provi ĉu la telekopiilo, la telefaksilo, funkciis. Nu, tiu linio ne funkciis unu semajnon pli frue, sed en la momento kiam la telefono strikis, ĝi brave faris sian laboron... Do komunikado ĉiam eblis, se vi nur sciis kiujn butonojn premi aŭ kiun numeron diskii.

Komunikado eĉ estis ebla triamane. Kelkaj inter vi jam eksciis, ke intertempe la eldonejon de MONATO oni kapablas atingi



per elektronika poŝto, aŭ – en la komputilspertula ĵargono – per „la reto”. Se vi posedas kaj komputilon, kaj modemon, kaj (funkciantan) telefonlinion vi nun povas sendi viajn leterojn – aŭ manuskriptojn – de via komputilo al nia. Vi devas koni nur la elektronikan adreson de FEL (vidu la maldekstran kadron), klavi SENDU aŭ iun similan ordonon, kaj via

mesaĝo fulmos tra tuta aro da telefondratoj, satelitaj stacioj kaj komputilejoj ĝis ĝi eksidos en la administrejo de via ŝatata magazino, atendante ĝis kiam en la mateno iu legos kaj traktos ĝin. Kaj tiu tuta vojaĝo ĉirkaŭ la mondo kostas ofte eĉ malpli ol letero, malpli ol internacia telefonvoko, malpli ol telekopita mesaĝo.

Ekzistas jam tuta telefonlibreto da „rete atingeblaj” esperantistoj. Kaj ne pensu ke en ĝi troveblas nur „riĉaj usonanoj” kiuj havas komputilon en ĉiu ĉambro. Ne, male al viaj supozoj, estas troveblaj tie eĉ adresoj de individuoj kaj organizaĵoj en Brazilo, en Kubo, en Kostariko, en Ruslando, en Latvio, nu en lokoj kien telefoni aŭ faksi eĉ foje estas malfacile aŭ neeble.

Ĉu venontjare do ni ĉiuj ricevos ĉiun unuan tagon de la monato nian revuon prezentita sur nia komputila ekrano? Nu, teorie tio estus ebla, eĉ hodiaŭ jam. Tamen, flanke de kelkaj ekranfanatikuloj kiuj petas eĉ al la amat(in)o rendevui „rete”, la plimulto preferas povi trafolumi gazeton, porti ĝin kun si en la mansaketo, konservi ĝin en la biblioteko, ŝiri ĝin kiam oni ne samopinias kun NikSt, Araneo aŭ GMA...

La presindustrio do certe ne mortos en baldaŭa estonteco, malgraŭ 100272.1601@compuserve.com kaj aliaj tiaj misteraj retadresoĵ dise tra la mondo.

Dume, agrablan legadon de tiuj ĉi 8 paperfolioj!

Desegnoarto

Dum universala ekspozicio de desegnoarto en la ĉefurbo de Japanio, la rumanaj lernantinoj gajnis premiojn: la „Grandan premion”, la trian kaj la kvaran. La ekspozicion konsistigis cent kvardek miloj da verkoj. La samaj infanoj el lernejo de la granda urbo en sudo de Rumanio, Craiova [Krajova] ricevis premiojn ankaŭ por verkoj ekspoziciitaj en Belgio.

Nic. MACOVEI

Kardinalo Glemp en Bukoveno

La pola kardinalo Glemp vizitis la du vilaĝojn el Bukoveno kie loĝas pola etno, Cacica [Kaĉika] kaj Solonet. Akompanis lin la pola ambasadoro en Rumanio kaj la episkopo de Bukoveno, Pimen. La kardinalo surpriziĝis konstatante ke iuj infanoj ne regas la preĝon „Patro nia”. Anstataŭe ili diris „Patrino mia”. Okazis diservo al kiu partoprenis ankaŭ vilaĝanoj el apudaj lokoj.

Nic. MACOVEI

Inventita malsano

Lastatempaj esploroj malkovris ke la origino de la aidoso-malsano povus esti la evoluigo de vakcino kontraŭ poliomyelito. En la kvindekaj jaroj tiu vakcino estis produktita per renohisto de simioj. Nun sciencistoj opinias ke en tiuj vakcinoj kuŝas la unuaj kontaĝoj de la aidoso-malsano kiu oftas ĝuste ĉe simioj. gvd

Rekorde malalta infanmorteco

En 1992 Kubo atingis senprecedence favoran rezulton je infanmorteco: nur 10,2 el mil vivnaskitoj. La oficiala ĵurnalo Granma elstarigis la fakton, ke malgraŭ la stagnanta ekonomio, kubaj medicinistoj kreeme laboras por daŭre konservi la atingojn de antaŭaj jaroj. Plej sukcesa rezulto okazis en la centra provinco Villa Clara, kies averaĝa infanmorteco por la tuta jaro estis nur 6,6 el mil; rezulto komparebla nur al tiu de tre evoluintaj landoj.

Maritza GUTIÉRREZ

Viajn kontribuojn por la rubriko „noticoj” sendu al la eldonejo:

FEL
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio



La 14an de februaro litovoj elektadis sian unuan post sendependiĝo kaj la kvaran en historio de ŝtata sendependeco prezidanton. Elektadkampanjon startis eĉ sep personoj, sed ĝis la tago de elektoj al tiu plej alta ŝtatposteno kandidatiĝis nur du: ĉefo de Litova Demokrata Laborista Partio (eks-komunista) Algirdas Brazauskas kaj sendependa kandidato, ambasadoro de Litovio en Usono kaj en Vatikano, Stasys Lozoraitis.

En la elektado partoprenis ĉirkaŭ 80 % de litovaj civitanoj. Por la unua kandidato voĉdonis 60 %, por la dua 38,2 % el ĉiuj partoprenintoj. Do estis elektita 60jara Algirdas Brazauskas.

Algirdas Brazauskas komentis la rezulton: „Nuntempe mia partio devas ekzisti sen mi. Por mi pli gravaj iĝas ŝtataj aferoj. Mi deziras, ke la partio postvivu. Por multaj postkomunismaj ŝtatoj nia partio estis kiel gvidilo.”

Stasys Lozoraitis siaflanke deklaris: „Mi pruvos, ke bravaj viroj scipovas malgajni. Necesas atenteme observi, kio okazos en Litovio post la elektoj. Mi multe maltrankviliĝas pri tio.”

Laimius STRAZNICKAS

Funkcianta kvara povo

La funkcion de amaskomunikiloj en demokrataj ŝtatoj oni ofte priskribas kiel tiun de kvara povo, apud leĝdona, ekzekutiva kaj juĝa povoj. Al tiu kvara povo oni atribuas la taskon, kontroli praktike ĉion en ŝtato, administracio, ekonomio kaj socio. Kaj ĵurnalistoj volonte pretendas plenumi tiun ĉi funkcion.

Kiom grava estas la kvara povo, ni povas konstati ankaŭ en negativaj okazoj: unu el plej unuaj fifaroj de puĉistoj kutime estas okupi centralojn de amaskomunikiloj, precipe televidajn kaj radiofoniajn, sed laŭeble ankaŭ redaktejojn de ĵurnaloj, kvankam tio estas ofte iom tro ampleksa tasko. Tial puĉistoj kutime tuj enkondukas severan cenzuron, por tiel malhelpi liberan ĵurnalismon.

Demisio post demisio

Ke tamen funkcias la kvara povo, tion ni spertas preskaŭ ĉiutage ie ajn en la mondo, kiam demisias iu eminentulo, kies skandalon rivelis ĵurnalistoj. Lastatempe ni observas tion precipe en Italio, kie la koruptiĝo fare de l' mafio publikiĝis pli kaj pli multe kaj ofte. Tiuj skandaloj - helpe de amaskomunikuloj kaj justico - forbalais jam tutan roton da politikistoj, industriistoj kaj aliaj eminentuloj kaj gravuloj. Sed eĉ en lando, kiu ĝis nun havis renomon de malkorupteco, nun la rivel-ĵurnalismo sukcesis detronigi eminentulojn: en Germanio ene de nur kelkaj monatoj demisiis pluraj ministroj de l' centra kaj federacilandaj registaroj, ministroprezidantoj kaj laste ankaŭ la estro de l' monde plej granda sindikato, la metalurgia. Precipe drasta estis la skandalaro de federacia ministro pri trafiko, Krause [Kraŭze]: dum monatoj ĵurnalistoj malkaŝis unu strangajon post la alia, ĝis fine eĉ kanceliero Kohl [Kol] diris „fino!“ kaj demisiigis lin.

Ŝajne nur bagateloj

Preskaŭ ĉiam temas ne pri unu giganta manipulaĵo, koruptiĝo aŭ misago, sed pri aro da ŝajne bagatelaj, ne malofte eĉ laŭleĝaj faroj, ekspluatadoj aŭ privilegiaĵoj; sed ili sumiĝas kutime tiel, ke estiĝas klara bildo pri tiu homo: riĉiĝema aŭ potencavida - aŭ ambaŭ. Ni prenu la ekzemplon de eksa sindikatestro Franz Steinkühler [Franc Ŝtajnkilr]. En sia funkcio de sindikata ĉefo li estis membro de l' kontrolkonsilio de mondfama kompanio Daimler-

Benz [Dajmler-Benc], kaj ĉi tiun mandaton eluzis por riĉiĝi; sciante internajn aferojn antaŭ la ordinaraj akciuloj, li sukcesis ene de kelkaj tagoj gajni centmilojn da germanaj markoj per aĉetado de akcioj. Oni tamen riproĉas al li ne nur tiun agon, kiu estis minimume marĝene de laŭleĝeco, sed ankaŭ atentigas pri la morala dimensio: kion pensu la miloj da sindikatanoj, kiujn en la kriza metalurgia branĉo minacas perdo de laborlokoj, pri tia riĉulo, kapitalisto pinte de l' sindikato.

Estas do ofte ne nur la monavideco de eminentuloj, kiuj en sia arogeco simple ignoras la sorton de l' simplaj civitanoj, kio agacas la publikon, sed ankaŭ ilia morala arogeco, kiam ekzemple politikistoj postulas monoferojn de impostpagantoj por elsavi la ŝtaton el ŝuldoj - sed samtempe ili ne nur estas riĉegaj, sed eluzas ĉiujn eblecojn por pliriĉiĝi. Tia ekzemplodona figuro estis ankaŭ eksa bavara ministroprezidanto Max Streibl [Maks Ŝtrajbl], kiu antaŭ jaroj feriadis je kosto de bona amiko, industriisto, kiu enkasigis subvenciojn de l' bavara ŝtato, feriadis en ties bieno en - Brazilo... Certe, per tio li ne damaĝis la bavarajn civitanojn, tamen restas la fiimpreso, ke li koruptiĝis de industriisto, kiu ricevis monhelpon de registaro, kies ĉefo estis Streibl. Fine li devis demisi.

Metodoj de rivelĵurnalismo

Ekzemplodona estas la skandalo pri Streibl ankaŭ pri la metodo de rivelĵurnalismo. Ne ĉiam estas nur tiuj amas-



Max Streibl, eksa bavara ministroprezidanto

komunikiloj, kies speciala celo estas ĝuste malkaŝi skandalojn. Pri la senpagaj turismaj ĝuoj de Streibl en Brazilo kiel unua eksciis redaktoro de regi-

ona ĵurnalo Augsburger Allgemeine Zeitung (Aŭgsburga Ĝenerala gazeto). Post apero de ties artikolo kompreneble ĵurnalistoj de multaj aliaj amaskomunikiloj komencis ankaŭ reserĉadi, kaj tiel kompletiĝis iom post iom la mozaiko de korupteco de tiu politikisto. Plej ofte tamen tiajn komencajn supozojn kaj konjektojn malkaŝas en Germanio la rivelmagazino Der Spiegel (La Spegulo); ne ĉiam el komenca suspekto vere estiĝas skandalo, ne ĉiam rezultas el tio demisio. Lastatempe, tamen, en Germanio multiĝis detroniĝoj iniciatitaj de l' kvara povo.

Perdo de intimsfero

Tial nun, post vico da skandaloj, gvidaj politikistoj, ĉepinte kanceliero Kohl (kiu perdis plurajn ministrojn pro tio), kunsidis en intima rondo - ankaŭ tion rivelis Der Spiegel - kaj cerbumis, ĉu kaj kiel restrikti la kvaran povon.

DER SPIEGEL

DAS DEUTSCHE NACHRICHTEN-MAGAZIN

Oni furiozis en tiu rondo evidente precipe pri tio, ke amaskomunikiloj en sia fervoro riveli skandalojn ne respektas la personan intimsferon. Kompreneble tuj post apero de informo pri tiu ĉi kunveno sekvis demento fare de l' kanceliero...

Tamen, la plendo ne estas tute malprava. Kompreneble iuj amaskomunikiloj, precipe klaĉgazetoj, avidas pri privataj skandaloj de eminentuloj, kaj ne malofte demisiuloj indikas kiel gravan motivon ĝuste persekutojn kaj ĉagrenojn de familianoj. Aliflanke ĉiu, kiu ekokupas publikan oficon, scias ke per tio li aŭtomate devas rezigni pri granda parto de sia privata vivo. Alimaniere ol en Germanio, kie amaskomunikiloj relative modere observas privatajn aferojn de eminentuloj, ni scias ja pri Britio ke tie la privataj problemoj de l' reĝa familio estas konstanta temo de amaskomunikiloj.

Simile en Usono, kie precipe la ŝtata prezidanto kaj ties familio - eĉ hejma hundeto aŭ kato - daŭre estas en fokuso de publika intereso. La nova (jam ne plu tute nova) usona prezidanto Bill Clinton [Klintn], cetere, ankaŭ jam spertis tion. Kiam antaŭ kelkaj monatoj mi epititis lin ĉiloke kiel „politikan klaŭnon“, mi rikoltis severajn admonojn de pluraj legantoj. Intertempe Clinton jam havas siajn proprajn skandalojn kaj devas malhavi ne nur mian adorem, sed perdis simpation ankaŭ de granda parto de l' usona popolo. Li do atentu, ĉar kiom bonege ĝuste ankaŭ en Usono funkcias la kvara povo, tion ni modele spertis okaze de l' fama Watergate-skandalo.

Stefan MAUL

Polemiko pri poŝto

Mi opinias ke Stefan Maul iom troigas plendante pri la poŝtaj servoj (MONATO, 1993/5, p. 5). Ne indas preni kiel ekzemplon la poŝton de lando kies strukturoj disfalis. Por mi estas preskaŭ miraklo ke mi ankoraŭ pli malpli regule ricevas reagojn al miaj korespondadoj kun Ruslando, Uzbekistano, Siberio... Tio pruvas ke eĉ en ege malbonaj cirkonstancoj la poŝtistoj sukcesas fari sian laboron. Certe la esperantistaro dum la pasinta jarcento elspezis grandegan sumon por poŝtmarkoj, sed elspezo de la kliento ne estas neta gajno por la poŝto! Cetere, la PTT ofte devas pagi parton de siaj enspezoj al la ŝtato, por kompensi la monopolon kiun ĝi ricevis. Precipe en Germanio temas pri konsiderinda sumo. Mi foje kalkulis kiom kostas averaĝa afranko de mia (ĉefe internacia) korespondado. Mi ne povas aĉeti trambileton, eĉ ne duonan panon, per la mono kiun la poŝto postulas por liveri koverton al mia korespondanto en alia lando aŭ alia kontinento. Ja foje io perdiĝas (ege malofte, laŭ mia sperto), ja estus agrable se ĉio alvenus, post unu aŭ du tagoj anstataŭ semajnoj, sed ĉu niaj mesaĝoj vere estas tiom gravaj? Se jes, uzu privatan poŝtservon, kaj pagu dek- aŭ centoblan tarifon. Sed, legante la lastan paragrafon de la artikolo, mi konstata ke mi verŝajne erare reagis: la teksto je estu en la rubriko „satiro“!

Roland Rotsaert, Belgio

Landnomoj

Mi konas la argumenton kontraŭ la ŝtatnomo „Ĉeĥio“, kiun mencias s-ro Maertens (MONATO, 1993/4, p. 7). Sed ĝi ne estas tre konvinka: Tiam ankaŭ Germanio ne nomu sin tiel, ĉar Germanio estis la hitlera ŝtato. Same Rumanio pro Ceaucescu, Italio pro Mussolini, ktp. Oni ne forgesu, ke la nomo „Ĉeĥio“ estis ja uzata en 1939-45, sed la oficiala titolo estas „Regna Protektorato Bohemio kaj Moravio“. Eĉ malpli validas la argumento por la konkreta kazo de Esperanto, ĉar la reguloj de la lingvo postulas diri tiel (aŭ Ĉeĥujo). Al la konfuza multeco da manieroj esprimi ŝtatnomon ni ne aldonu plian!

Reinhard Pflüger, Germanio

Landnoma labirinto


Miajuĝe – miascie laŭ popolo aŭ nacio oni formu landojn nur de eŭropaj, aziaj kaj certaj afrikaj geografiaj unuoj kaj ĉi tion rajtas ne nur ĉinoj, japanoj, sed ankaŭ egiptoj, koreoj, vjetnamoj (MONATO, 1993/5, p. 6). „Kotdivoara“ estas francomanio, „Ivorikoasta“ estus anglomanio, do ne konsiderebla serioze. (Simile estas, se Hoŝiminurbon oni nomas Hoĉiminurbo.) Ne ĉio nacilingva disvastiĝas internacie, eĉ se ekuzita iu lingve. Bangladeŝo kaj ĉu Barato plus Mjanmaro iam? – Mi ne vetus certege! – Nek deŭĉo, nek magjara sekvas prononcon-skribon nacilingvan, ilin certe inventis nekonantoj de

tiuj lingvoj. Francoj esperante ne fransoj! La hungara-finna-estona (finnugraj lingvoj) ne havas mondlingvajn ambiciojn se eble tial kontraŭstaras ukrainanoj al Ukraino, ĉar ĝi estas preskaŭ la hungara formo (= Ukraina) kaj ke popolo aŭ nacio ne sentiĝus, se oni dirus ukrainano, sed kiu ajn estanta tie ĉu tiu aŭ aliŝtatano. Ĉado, Kameruno, Kanado, Meksiko, Luksemburgo, Zairo!... ne bezonas landosufikson. Ĉefurbon, montaron, riveron, vestaĵon aldoni prefere, se nepre oni emas plilongigite precizigi. Mi mem ne samopiniias kun vi, ke eĉ malbona propono de reformista AE (aŭ AdeE) prezidanto estus bona. Iam en SAT oni trudis superflue la sufikson -i-, eĉ sen la landnomoj jam troŝarĝitan. Ankaŭ Brazilo bonege restas sen ĝi kaj cedis ĝin por sia ĉefurbo. Oni devas havi ĝustan konon-scion, propran opinion, ne lasi influi sin de naciaj lingvoj, ties maniuloj, reformistoj, komencantoj, miopuloj!

Georgo Csüllög Vésztő, Hungario

Landnomoj senescepte

Esperanto estas lingvo, kiu, se eble, devigas regulojn senescepte. Mi demandas al la Akademio kial ĝi ne faras same por landnomoj? Mi proponas, eble inter aliaj solvoj, jenan (K signifas „konsonanto“; V (aŭ V') signifas „vokalo“): Se landnomo (nacilingve) finiĝas per j+V aŭ j, tiam en Esperanto oni aldonu -lando; se ĝi



Ne nur landnomoj ankaŭ leteroj de legantoj ofte estas labirintaj. Jen ekzemplo – tamen pro nia ne-ebleco kvarkolore presi MONATOn, al la legantoj mankas la koloraj reliefoj. Ili donas al tiu ĉi letero iun aldonan valoron (sen-impostan), kiu dolĉe briligas la vivon de kompostisto kaj redaktoro.

finiĝas per K (krom j), tiam oni aldonu -io; se per K (krom j)+V, tiam devone oni aldonu -io; io restu io; se la landnomo finiĝas per V+V' (krom o), la Esperanta traduko iĝu V-lando (ĉar se oni aldonus -io oni havus 3 vokalojn, kio estas iom tro); se la originala nomo finiĝas per -land, oni uzu -lando; la nacialingva vorto por respubliko tradukiĝu respubliko; mallongigoj: komencaj majuskulaj literoj: ekzemple UŜNA anstataŭ Usono. Por loĝantoj, se la landnomo finiĝas per io, ni skribu -o, se la landnomo finiĝas per lando, ni skribu „-landano”; se la landnomo finiĝas per Respubliko, ni skribu „respublikano”.

Raymond Marty, Francio

IRK-oj

Rilate al la korespondado pri IRK-oj, ŝajnas al mi, ke estas tempo por la poŝtaj instancoj de la EK eldoni samdesegnan poŝtmarkon por uzo inter ĉiu lando de la komunumo. Tiuj poŝtmarkoj povus esti vendataj je la kutima prezo por leteroj al aliaj landoj de la komunumo sed ili estus nur uzeblaj sur leteroj eksterlanden. Uzante tiajn poŝtmarkojn oni povus provizi afrankitan, mem-adresitan koverton al korespondanto interne de la EK. La afero supozeble ŝparus monon nuntempe elspezatan pro la burokrateco ligita al la nunaj IRK-oj. Se la instancoj povus interkonsenti pri prezo-„gradoj” permesantaj la uzon simple de kelkaj de la samaj poŝtmarkoj por leteroj al landoj ekster la EK (aŭ pli pezaj) eble ili povus etendi la ideon al ĉiuj landoj de la mondo – ja estas jam internacia poŝta unuiĝo. Henry Palmer, Britio

Per spirita forto (1)

Pli kaj pli la homaro konsciiĝas, ke ni, homoj, posedas spiritajn fortojn (MONATO 1993/5, p. 26) per kiuj ni povas multon atingi, se ni fidas, kredas kaj kapablas uzi ilin, ofte helpe de aliaj spiritoj. Mi mem ekzemple kredas tion. Post grava aŭto-akcidento – dum unu monato oni ne sciis, ĉu mi vivos aŭ ne, tamen, danke al forta kredo, ke bonaj spiritoj kunhelpas en miaj penoj resaniĝi, mi resaniĝis. Tio daŭris kvar jarojn, sed la rezulto estis pli ol kontentiga. Tiutempe mi ne aŭdis ion pri la doktrino de Bruno Gröning, sed mi kredas, ke li kapablis vekti spiritojn en homoj kaj per tio helpi al ili. Mi bedaŭras nur, ke la aŭtoro de la artikolo ne skribis iom pli pri *kiamaniere* oni nun praktikas la doktrinon de Gröning. Min persone tio inte-

resas. Kion pensas aliaj legantoj pri la temo?

Mila v.d. Horst-Kolinska, Nederlando

Per spirita forto (2)

La artikolo de D. Maier, „Saniĝo per spirita forto” (MONATO, 1993/5, p. 26) estas gratulinda. Mi jam havis eblon ekscii pri tiu kampanjo en germana kaj esperanta lingvoj. Surbaze de diversaj sukcesraportoj de diversaj suferintoj en la mondo mi firme kredas je rezulto pozitiva kaj estus bone iam aperigi koncize en nia revuo instrukciojn kiamaniere progresi se ne ekzistas amikaro de B. Gröning sed nur izoluloj. Anticipan dankon.

Mir Zavodsky, Ĉeĥoslovakio*

(* La skribanto ne menciis en kiu parto de la duigita lando li loĝas.)

Per spirita forto (3)

La Amikaro Bruno Gröning (MONATO, 1993/5, p. 26) daŭre kreskas. La aktuala nombro da unuopaj komunumoj jam estas 187, la nombro da amikoj estas 10 500. En la medicinscienca fakgrupo estas 450 fakuloj el medicinaj profesioj. Ekzistas komunumoj en Germanio, Nederlando, Belgio, Francio, Hispanio, Portugalio, Svislando, Italio, Aŭstrio, Rumanio, Hungario, Pollando kaj Usono. Al la komunumo de la esperantistoj apartenas 120 homoj el 35 landoj. La libroj, sonbendoj kaj vidbendoj estas tradukitaj ankaŭ en la ĉeĥan, svedan kaj bulgaran lingvojn.

Barbara Schreek, Germanio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

**FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio**

Cousteau (1)

Mi trovis (MONATO, 1993/5, p. 2) en esperanta teksto, la subskribon de Jacques-Yves Cousteau. Lia peticio por la rajtoj de la venontaj generacioj estis esperante tradukita. Fakte, oni povas legi en interŝanĝitaj leteroj kun S-ro Cousteau la ĉi-tian opinion: *Dankon pro laboro kion vi faras [...] Viaj multaj kontaktoj kun granduloj kaj ankaŭ malgranduloj (kiu estas grandulo, kiu estas malgrandulo?!), verŝajne pensigas vin pri la lingva problemo. Certe, via scienca vivo do-*

nis al vi la anglan lingvon kiel ilon por internacia komunikado. Ŝajnas al mi interesa via opinio, konsiderante ia sekvontajn punktojn: la angla lingvo monopolas internacian komunikadon kiel fakta filtrilo kontraŭ malplimultaj eldonadoj kaj esprimadoj; la angla lingvo asertas la american way of life (usona vivmaniero) kiel normon de civilizita homo; la angla lingvo estas la unua pordo por la okcidenta komerco en la trian mondon; la angla lingvo estas malfacile lernebla ekster angleparolanta lando; la internacia angla lingvo reduktas kaj dissignifigas transirotajn ideojn [...] (ekstrakto el letero de G. Lemaitre, 29-6-1992). La respondo de Cousteau (5-7-1992): [...] La angla lingvo iĝis, kia ajn estas la opinio, la lingvo por internacia komunikado, fakte kaptante rOLON kiun iuj volis teni je Esperanto (kiu alie estus unu lernota lingvo plia...). Estas ĝuste tiel, ke amerika modelo povas disvastiĝi pli facile. Tamen, necesas memori ke la angla influo orientiĝas kaj influas al nesama direkto. Aliflanke, ni vidas tutmonde vekigon de regionismaj konsciencoj, incitante serĉadon al profundaj radikoj, kiuj reprezentas malon de usontipa unuformigo. Kunagu por defendi kaj uzi nian francan lingvon... Ĉu eblas samtempe aserti la neutilecon de rimedo kaj uzi ĝin? Mi esperas ke s-ro Cousteau ŝanĝis sian opinion pri Esperanto, kiam li ekvidis la potencon de Esperanto por disvastigi sian belan ideon. Se ne, mi opinias, ke MONATO estus kritikinda pro tia duobla sinteno.

Gildas Lemaitre, Francio

(*N.d.l.r.*: Eĉ se aliaj – uzante la eblecojn de nia ideo – rifuzas ĝin akcepti, tio ne igus nin rifuzi ilian ideon, se ni ĝin konsideras bona.)

Cousteau (2)

La redakcia teksto pri la skipo Cousteau (MONATO, 1993/5, p. 3) kaj ĝia alvoko postuli deklaron pri la rajtoj de la venontaj generacioj estis interesege. Mi jam delonge subskribis tiun deklaron. Sed mi volas nur substreki ke *Calypso* (Kalipso) ne estas submara ŝipo, ĝi estas surmara, enhavanta etan submarŝipon kaj ankaŭ helikopteron, por faciligi la maran aŭ la teran esploradon. La Cousteau-skipo ankaŭ ofte uzas plonĝmaterialon, por esplori bordojn de maro, aŭ subakvajn grotojn, ĝis malgranda profundaĵo. Ĝi faris multajn tre interesajn filmojn kaj lastatempe unu pri Danubo.

Raymond Marty, Francio

TOGOLANDO

Seneliro

Togolando sendependiĝis en aprilo 1960 kun vere demokrata reĝimo. Pro sia malŝato de militaj aferoj, la unua prezidanto, Sylvanus Olympio [Silvanus Olimpio] ne volis organizi ian armeon. Jen iu serĝento, Eyadema Etienne [Ejadema Etjen], servinta en la franca armeo kiel kuiristo en Alĝerio, mortigis tiun prezidanton en januaro 1963, kaj konfidis la gvidadon de la lando al Grutznisky [Grucniski]. Kvar jarojn poste, en januaro 1967, tiu Eyadema venis kaj puĉis kontraŭ la dua prezidanto, surtronigis soldaton, kiu siavice estis renversita de la sama Eyadema en aprilo 1967. Jen do Eyadema akaparis tiam la povon, kiun li ĵaluze konfiskis ĝis nun. Post kiam li aŭtokrate gvidis la landon dum pli ol 20 jaroj, la popolo ekbolis en oktobro 1990 por montri sian malkontenton pri la diktaturo. Tiu bolado pluiris per strikoj, manifestacioj, kaj Eyadema ĉiam buĉadis la popolon. Finfine okazis en julio/aŭgusto 1991 nacia konferenco por irigi Togolandon sur demokratian vojon. La finon de la konferenco markis la elekto de ĉefministro kaj konsilantaro (provizora parlamento), kiuj prizorgu la ŝtatajn aferojn ĝis la starigo de demokratia reĝimo en la lando.

Eyadema ne volas malaperi

Elektite ĉefministro, la advokato Koffigoh [Kofiego] starigis sian ministraron. Tiu registaro havis kiel ĉefan taskon, la organizadon de la ba-

lotoj kaj referendumoj por enradikigi la demokration en Togolandon.

La nacia konferenco taskis la ĉefministron fari tiun laboron en unu jaro; la limdato estis la 28a de aŭgusto 1992. Tiu tago estis alproksimiĝanta, sed neniu baloto okazis. Kulpas pro tio ne la transira registaro, sed la ŝtatestro Eyadema, kiu ĉiam embuskis kontraŭ la naskiĝonta demokratio: atencoj kontraŭ la ĉefministro, detruo de domoj de opoziciuloj, masakro de la popolo fare de la togolanda armeo, persekuto de partiestroj kaj ministroj, renovigo de la ministraro por kontentigi la volon de Eyadema, ktp. En tiu etoso plenplena je malsekuro, dronis la transiraj registaroj ĝis la lastaj tagoj de la transira periodo. Onidire Eyadema estis tiam preparanta sin por repreni la tutan povon post la 28a de aŭgusto 1992.

Por eviti tiun novan diktaturon kaj per la helpoj de diplomatoj alilandaj, rezidantaj en Togolando, okazis interkonsento inter la prezidanto kaj la opozicio por dividi la povon. La ĉefministro devis tiam starigi alian ministraron, sian trian. La formado de tiu ministraro naskis problemon, kiu ŝovis Togolandon en seneliran situacion.

Opozicio ignorata

Laŭ la interkonsento inter la prezidanto kaj la opozicio, la postenojn en la registaro devas egale dividi inter si tiuj du partneroj. La ĉefministro devus do konsulti la du partiojn, antaŭ ol starigi la ministraron. Sed okazis, ke tiu ĉefministro ignoris la opozicion, kaj konfidis la ĉefajn postenojn al la kunlaborantoj de la prezidanto.

Malgraŭ la multaj protestoj de la opozicio, la ĉefministro altrudis al la parlamento la aprobon de siaj proponataj nomoj por la registaro. La parlamento fariĝis malforta antaŭ tiu perfortaĵo de la ĉefministro; ĝi tial ne povis rezisti al tiu postulo, kaj jen la ministroj ekagis:

– La ministro pri eksteraj rilatoj travagis la mondon por disvastigi misinformojn pri Togolando. Li tiel propagandis por la generalo Eyadema, kiun la tuta mondo jam konis kiel malbonintenculon;

– La ministro pri internaj aferoj kaj sekureco vagadis tra la lando, mensogis al la kompatindaj senalfabetuloj, organizadis manifestaciojn, ktp.

– La ministro pri komunikado kaj kulturo malpermesis al la opozicio esprimi sin tra la ŝtataj elsendostacioj! Kontraŭe, li disponigas ĉiujn komunikilojn ŝtatajn al la prezidanto, kiuj uzas ilin por diskonigi troigajn deklarojn, anoncojn kaj komunikojn favore al Eyadema, kaj malfamigajn informojn direkte al la opozicio.

– La ministro pri nacia defendado ribeligis la armeanojn, ĉe sia enoficiĝo li dankas la militistojn pro iliaj masakradoj, kaj promesis ĉiam protekti ilin, kiaj ajn estos ilia eraro fronte al la popolo.

Forkapto

La kulmino de tiu ago, konduto de la ministroj, estis la forkapto de la parlamentanoj: la ministroj pri sekureco kaj nacia defendado ĉeestis tiun forkaptadon. Ankaŭ la ministro pri eksteraj rilatoj sidis silenta antaŭ tiu misfamiga ago. Tiuj tri ministroj devus tiam klarigi al la parlamentanoj pri siaj agoj ĉi-supre menciitaj. Soldatoj de la togolanda armeo vipis, vangofrapis, humiligis, malhonoris la parlamentanojn. Apude, ili masakris ĉiujn preterpasantojn, bruligis veturilojn. Tio estas nur unu el multaj malnoblaj planoj, kiujn plenumas la ministroj, kunlaborantoj de Eyadema, la elektitoj de la ĉefministro Koffigoh.

La opozicio, kiu estis montrinta sian malkontenton al la ĉefministro pri tiu ministraro, pruvis al tiu, ke vere lia nova ministraro neniel kongruas kun la bezonoj de la lando. Multaj togolandanoj kontestas la ministrecon de pluraj membroj de tiu registaro. La partopreno de ministroj en la forkaptado de la parlamentanoj fare de soldatoj devigis la centralojn laboristajn postuli la instaladon de sekureco tra la tuta lando. Por apogi sian postulon, la centraloj lanĉis alvokon



La togolanda ĉefministro Koffigoh

por striko. La 16a de novembro 1992 estis la unua tago de la striko, kiu daŭras ĝis nun dum mi verkas tiun ĉi artikolon (marto 1993).

Strikoj, malsato kaj malsano

Togolandanoj vivas do en danĝero kaŭzita de la registaroj kaj Eyadema. Ĉiamaj masakroj fare de militistoj, longa striko, malsato kaj malsano, jen kelkaj el la multaj problemoj, kiuj ĉirkaŭas la togolandanojn. Anstataŭ serĉi vojon por mildigi la situacion, la malmolnuka ŝtatestro pli kaj pli suferigas la popolon. La 25a kaj 30a de januaro 1993 pli ol cent togolandanoj mortis pro misfaroj de soldatoj. Por eviti pliajn tiajn agojn la loĝantoj de la ĉefurbo, Lomé, forfuĝas al najbaraj landoj kaj al la kamparo. Aliaj urboj de la landoj perdis loĝantojn, multaj timas la baldaŭecon de intercivitana milito.

Nun pli ol cent mil togolandanoj rifuĝis al Benino kaj Gano kun poŝoj truitaj, ĉar la kvarmonata striko jam antaŭe malplenigis la monujon. Tiu stato de la togolanda popolo neniel ĝenas la ŝtatestron. Per la fortoj de la armiloj li ĵus formis novan ministraron, la kvaran dum la transira periodo, kun ĉefministro Koffigoh nun kontraŭulo de la opozicio: li cedis al ĉiuj postuloj de Eyadema. Koffigoh havas nun neniun decidrajton. Li estas nur formala ĉefministro, kaj ĉio dependas de la volo kaj fantazio de Eyadema. La opozicio neniel volas cedi. Tiel ĝi postulas la nomumon de alia ĉefministro, kiu kapablos sekvi la veron ĝis la starigo de demokratia reĝimo en la lando. La parlamento aprobas la ideon de la opozicio, sed la ŝtatestro Eyadema ne plu volas rekoni tiun parlamenton. Tamen tiu leĝofara instanco de la transira periodo daŭrigas sian agadon. La opozicio ĵus proponis al la parlamento kandidaton por la posteno de ĉefministro. Tiu kandidato estus nekoruptebla kaj modera. Jen la ĉirkaŭaĵo de la prezidanto kaj ĉefministro boladas kontraŭ tiu decido. Ĉu nun la parlamentanoj kunvenos por decidi pri io?

Kia demokratio por Togolando? Tagoj pasis, sinsekvas. Ĝis nun nenio estas certa pri la estonteco de la togolanda reĝimo. Anstataŭ iri rekte al la bonvenaj postuloj de la centraloj kaj revenigi pacon en la lando, Eyadema ĉiam pliakrigas la krizon per timigaj decidoj, kio pluakcentas la elmigradon de togolandanoj al aliaj landoj, kaj tiel elmetas ilin al ĉi-aj suferoj.

Ĉu ankoraŭ Togolando estas taŭga grundo pro demokratio?

Delfeno TIETTI

LA MONDO EN MAJO 1993

1a Okaze de la unuamajaj manifestacioj en Moskvo, 500 komunistoj kaj policistoj interbatalas.

1a Bérégovoy, eksa franca ĉefministro, mortigas sin pro neelteno de la politika fiasko de sia partio.

1a Premadas, srilanka prezidanto, mortas pro atenco. Ĉefministro Wijetunga iĝas nova prezidanto.

2a En Ateno konkludiĝas konferenco pri Bosnio-Hercegovino. Karadžić, ĉefo de la bosniaj serboj, subskribas la Vance-Owen-planon. La usona prezidanto Clinton minacas per armea interveno.

3a Engholm, prezidanto de la germana socialista partio kaj ministro-prezidanto de Schleswig-Holstein, subpreme demisias de siaj oficioj. Li konfesas esti mensoginta lige kun la Barschel-skandalo.

5a La usona engaĝiĝo en Somalio finiĝas. Germanoj transprenas la taskon.

6a La parlamento de bosniaj serboj rifuzas la Vance-Owen-planon.

8a En Hago 20000 gestudentoj protestas kontraŭ la ŝparemo de la nederlanda registaro. Bataloj kun la polico kaŭzas vunditojn kaj arestitojn.

9a Aptidon iĝas prezidanto de Ĝibutio en la unuaj demokratiaj elektoj de la orientaŝtato.

9a Wasmosy de la Colorado-partio iĝas prezidanto de Paragvajo.

10a La separatista movado de Korsiko relanĉas serion da bombatencoj.

12a Litovio kaj Slovenio iĝas novaj membroj de la Eŭropa Konsilio.

13a Vaŝingtono definitive rezignas pri la kosmoraketa programo „Stela milito” (SDI).

13a Estonio estas akceptita en la Eŭropa Konsilio.

16a Demirel iĝas nova ŝtatprezidanto de Turkio.

16a Referendume, la bosniaj serboj rifuzas la Vance-Owen-planon.

17a Karadžić rifuzas unuecan bosnian ŝtaton kaj la Vance-Owen-planon. Okcidento diskutas la establon de protektazonoj por la islama loĝantaro en Bosnio.

18a Dum 2a referendumo en Danlando, 57 % de la voĉoj akceptas la Matriht-kontrakton. Post la baloto, protestgrupoj grave interbatalas kun la polico.

18a Ĉinio protestas kontraŭ la renkontiĝo de Dalaj Lama kun la brita registaro.

20a Benvenuto, sekretario de la itala socialista partio, demisias, protestante kontraŭ la malhelpoj

reformi la partion. La ĝenova polico arestas la urbestron pro supozataj malregulecoj en lia ofico.

20a Vaŝingtono diplomatie agnoskas la MPLA-reĝimon de Angolo.

20a Kuĉma, urkaina ĉefministro, demisias pro la intenco de la ŝtatprezidanto Kravĉuk mem transpreni la registaran gvidon. La parlamento rifuzas lian demision. Kravĉuk ricevas specialajn rajtojn koncerne ekonomiajn demandojn.

21a Jelcin kunvokas konstitucian konferencon por la 5a de junio klarigante kaj tiel ignoras la popldeputitan kongreson, kiu antaŭ nelonge strebis elimini lin.

21a Pérez, venezuela prezidanto, estas akuzita pro misuzo de sia ofico.

23a En Kampuĉeo komenciĝas parlamentaj elektoj kun vasta popola partopreno. Kvankam Ruĝa Kmero anoncis atencojn, la situacio trankvilas.

24a Eritreo, eksa etiopia provinco, iĝas nova sendependa ŝtato, kies 1-a prezidanto nomiĝas Afewerki.

24a Portugalio protestas kontraŭ la karcerpuno por la ĉefo de la opozicio en orienta Timoro, okupata de Indonezio.

24a En tibeta ĉefurbo Lhaso paca protesto kontraŭ prezaltigoj transformiĝas en perfortaj manifestacioj favore al la sendependeco de la lando. La polico severe reagas.

25a Serrano Elias, gvatemala prezidanto, arbitre eksvalidigas la konstitucion kaj la parlamenton.

26a Alĝerio esprimas 38 mortpunojn kontraŭ radikalaj islamanoj.

26a La Sekureca Konsilio de UN unuanime decidas la instalon de tribunalo por esplori la militkrimojn en eksa Jugoslavio.

27a Bombeksplozo – supoze fare de mafio – en Florenco mortigas plurajn homojn kaj detruas valoraĵojn. Sekvas tutlandaj protestoj.

27a Post Alĝerio ankaŭ en Egiptio esprimiĝas mortpunoj kontraŭ radikalaj islamanoj. Islamaj aŭtoritatoj kondamnas la akademian liberecon de la universitatoj.

28a La pola registaro sub la gvido de Suchocka demisias post esprimo de malfido de la parlamento.

28a La Sekureca Konsilio de UN konfirmas la novan limon inter Kuvaĵto kaj Irako.

30a Wałęsa, pola prezidanto, likvidas la parlamenton.

30/31aj Novaj rasismaj brulmurdoj en Solingen (Germanio) incitas la animojn en Germanio kaj Turkio.

JAPANIO

Paradizo de koruptiĝo

Ekde la lasta jaro Japanio estas skuata de politika skandalo envolvanta gangsterojn (vidu MONATOn, 1992/3). Temas pri eksa ĉefministro de Japanio, kiu pagis monon al gangsteroj por aĉeti pacon koncerne tutlandan kampanjon kontraŭ sia nomumado kiel ĉefministro. Tio estas nur la plej nova en la longa serio de similaj okazaĵoj en la postmilita Japanio.

Ĉiun fojon la popolo indignis kaj ĵuras, en leteroj al redaktoroj, purigon per nevoĉdono por koruptitaj politikistoj, dum tiuj ĉi deklaras valorigon de etiko. Ĉiun fojon samaj vizaĝoj reakparas la politikan scenon, tiel ke la sama historio ripetigas.

Japanoj diradas, ĉu arogante, ĉu humile, ke la politiko de Japanio estas triaranga dum ĝia ekonomia estas unuaranga. Oni havas tamen sufiĉan grundon por dubi tiun aserton. Estas la samaj japanaj entreprenoj produktantaj bonkvalitajn varojn malaltkoste, kiuj ŝmiras la manon de politikistoj per malpura mono.

Envio

La kolero de la plebo aspektas esprime de ĝia sento de justeco sed en realo ne estas alio ol envio pro la profitoj de aliaj. Du fojojn jare, jar-meze kaj jarfine, la japanoj engaĝiĝas en Bakĥanalio de donacoj: individuoj kaj firmoj donacas, farante el la du jartempoj sezonojn de gajno por grandmagazenoj. Reciprokaj interŝanĝoj tamen ne ekzakte estas la okazo: la ricevantoj estas plej ofte la partioj ekonomie avantaĝaj. La vendantoj de varoj donacas por gajni favoron ĉe la aĉetantoj. En la okazo de reciprokaj donacoj, kiuj ja estas ankaŭ vaste praktikataj, direktoroj kaj komizoj interŝanĝas pli malpli similvalorajn objektojn tiel ke dono kaj ricevo ŝajne forstrekas unu la alian. Ĉi-okaze direktoroj kaj komizoj ŝtelas de siaj propraj entreprenoj en perfekta eŭforio por provizi donacojn.

Mezepoko

En Novjorko, klientoj resendis donacon, kiun japana kompanio sendis en la kristnaska sezono, kun ĝentila letero, kiu diras ke ricevo de donacoj de klientoj estas malpermesata de la principo de iliaj kompanioj. Tio

montras, kia estas la moderna kapitalismo. Estas komuna kono, ke en evoluantaj landoj, inkluzive de socialistaj oficialuloj, ekzemple doganistoj, ricevas monon sen ia ajn simptomo de honto. Tiu cedis lokon al racia entreprenado surbaze de justa konkurenco. Japanio estas meze inter la du. Oni neniam povas diri, ke la japana estas moderna kapitalismo.

Oni facile forgesas, ke la moderno ekzistas nur en okcidenta Eŭropo kaj norda Ameriko. En la resto de la mondo, kiu merĝiĝas en mezepoka tenebro, modernigo estas progresiga. La modernigo signifas nek senliman postkuron al profito nek disrompon de medio; ĝi estas etikigo de la socia etoso.


YAMASAKI Seikō

Azio kontraŭbatalas

La urbo Bangkoko en Tajlando estas la ĉefa centro por ekspedado de la drogaĉo heroino tra duoninsulo Malajzio, laŭ raporto de Internacia Buroo pri Kontrolo de Narkotikaĵo. Indonezio, Malajzio, Filipinoj kaj Singapuro estas transiraj landoj por kontraŭleĝaj heroinaj sendaĵoj celitaj al Aŭstralio, Eŭropo kaj Norda Ameriko.

Tamen, la landoj en orienta kaj sud-orienta Azio pliintensigas la kunlaboron kontraŭ la narkotika produktado kaj ekspedado. Depost 1983, la malajzia registaro donis prioritaton al la drogaĉoproblemo kaj estigis plurajn centrojn tra la lando por resanigi kaj elvenenigi la droguzantojn.

Chan Sook WAI



Vagonkonduktorinoj ekĝojis, kiam en la sama trajno Vilnius-Moskva-Vilnius ilin akompanos oficistoj de transporta polico. „Se vi pli ofte veturus kun ni, eble mafio trankviliĝus”, parolis vagonestrinoj. Mafio la virinoj nomas junajn personojn, kiuj veturadas al la ĉefurbo de Ruslando por tie serĉi malpli kostajn varojn. Por policianoj tiaj komercvojaĝantoj estas simple nur huliganoj: dumvojaĝe ili drinkas, ekirigas kverelojn, ĝenas aliajn vojaĝantojn.

Ekzemple, en Moskvo iu grupo de junuloj, veturantaj al la litova urbo Kaunas, ŝarĝis la vagonan kupeon per multaj kestoj kun cigaredoj. Subite aperis kelkaj kaŭkazdevenaj viroj, kiuj postulis pagi monsumon pro la eksportata varo. Kaŭkazanoj rifuzis. Tiam tamen ĉikanantoj enrajniĝis en la saman vagonaron kaj postulis parton de la portata ŝarĝo. Por eviti komplikajojn, la litovanoj jesis al la postulo. Kiam trajno haltis en stacio de rusa urbo Viazma, kaŭkazanoj portis rabajon en stacidomon. Tion ekvidis el apuda vagono alia grupo de litovaj

komercistoj, sufiĉe agresemaj rilate al rabistoj. Komenciĝis interbatiĝo, sur kapoj frakasiĝis boteloj, falis fenestroj de stacidomo, sur perono ekfluis sango, aperis grave vunditaj. Laŭ opinio de lokaj milicistoj, tiufoje venkis litovanoj; ili reprenis siajn cigaredojn kaj forveturis.

Oficistoj de litova transporta polico kaj rusa milico konsentas, ke instancoj de ambaŭ ŝtatoj devus komune kontribui al prevento de krimeca situacio en trajnoj kaj stacioj dum lastaj monatoj. Tamen, viktimoj neniam demandas helpon ĉe stacidoma milico, ĉar preskaŭ ĉiuj varoj estas transportataj kontraŭleĝe. Milicistoj ofte speras tiajn vidaĵojn: al sur perono stokitaj kestoj kun cigaredoj venas grupo de rabistoj kaj trankvile kunportas parton de la posedaĵo.

Nuntempe en Moskvo oni povas akiri preskaŭ ĉion, kio en Litovio vendiĝas pli multekoste. Tiu diferenco de prezoj alportas al vojaĝantaj komercistoj ceteran profiton. Profiton kontraŭ risko por la vivo?

Laimius STRAŽNICKAS

Unua etiopa restoracio

Lastatempe pligrandiĝis la komunumo de etiopaj judoj en Israelo. Kaŭze de malstabla situacio en Etiopio la israela registaro evakuis milojn da etiopaj judoj. Tamen la integriĝo al israela socio ne estas tiom facila kiom la alveno. Multaj novvenintoj havis nek profesion, nek klercon, kaj estis inter ili malsanaj aŭ simple ne adaptiĝemaj homoj. La integriĝo de la etiopoj nuntempe estas unu el la gravaj taskoj de Israelo.

Por helpi la etiopojn malfermiĝis pasintjare en Jerusalemo la unua etiopa restoracio. Al la malferma ceremonio alvenis la urbestro. La restoracion malfermis enmigrintoj, kiuj loĝas en Israelo jam en 1985. La kuiristo spertas pri preparado de tradicia etiopa pano, „ingira”. La manĝaĵo ĝenerale estas iom akra, sed novuloj povas ĉiam peti ion pli kutiman. Ĉio estas preparata laŭ reguloj de juda kuirkutimo. Multaj tre ŝatas la etopan restoracion kaj ties gastamajn posedantojn.

Eugenia RUBIMOV-FAJGENBOIM

ĈINIO

Kiom da drogaĉemuloj?


Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 la registaro malpermesis toksaĵo-komercadon kaj preskaŭ troviĝis neniu drogaĉemulo dum la periodo de Maŭ Zedong.

Tamen, Ĉinio malfermis sian landan pardonon post 1978, kio instigis disvastigon de la ekonomio kaj interfludon de kulturoj kune kun novaj sociaj problemoj. Ekzemple toksosorbado. Laŭ Gu Yingqi [Gu Jingĉi], vicministro pri publika sano, en Ĉinio nun troviĝas 250000 toksigemuloj. En la lando troviĝas kontraŭleĝa kultivado, produktado kaj komercado de toksaĵoj.

Toksiĝemuloj plejparte estas junuloj; krome, toksosorbado pere de vejn-injektado estas ĉefa vojo de infekto per aidoso. Ĝis fino de junio 1992, tri kvaronoj el la trovitaj aidosmalsanuloj en Ĉinio estis toksigemuloj per vejn-injektado.

Por forte bati la kriman toksosorbadon la ĉina registaro prenas serioze rimedojn. Leĝoj severe punas toksaĵ-komercistojn kaj la sentoksigiga laboro jam kaptis la atenton de la tuta socio.

Shi CHENTGAI



LIBERTEMPO

Revoj realigitaj

Du horoj da instruado kontraŭ 130 britaj pundoj (ĉ. 190 usonaj dolaroj): nur frenezuloj tiom elspezus. Aŭ ĉu? Fakte 109 homoj – inter ili virinoj – tiom elpoŝigis por realigi revon: lerni kiel konduki unu el la plej potencaj kaj famaj britaj vapor-lokomotivoj, *Flying Scotsman* (Fluganta Skoto), laŭlonge de 12kilometra privata turistofervojo en Nord-Anglio.

En 1928 *Flying Scotsman* famiĝis kiel unua lokomotivo, kiu senhalte veturis inter Londono kaj Edinburgo (ĉ. 650 km); en 1935 ĝi denove frakasis rekordon kaj kiel unua oficiale atingis tiam ‚magian’ rapidecon de 100 mejloj/hore (160 km/h). Post emeritiĝo en la 60aj jaroj *Flying Scotsman* rel-steluliĝis en Usono kaj Aŭstralio.

Instruatoj – en la kondukistejo sub gvidado de sperta lokomotivestro – ne ‚flugigos’ la Fluganton. Male. Tamen ili transportiĝos en pasintan kaj nostalgian mondon de vaporu, fumo... kaj juneco.

Paŭlo GUBBINS

FUMADO

Viktimo venkas

Nefumanto elmetita dum pli ol 10 jaroj al la efikoj de cigaredoj de kolegoj kompensiĝis per 15 000 britaj pundoj post – almenaŭ en Britio – historia decido.

Sinjinoro Veronika Bland, 36jaraĝa, atestis, ke dum plej malsaniga 14monata periodo ŝi kontraŭvole enspiris ĉiulabortage fumon el 150 ci-

garedoj. Ŝi konstante tuis kaj suferis pro kataro kaj okulo-iritoj, tiel ke ŝi estis finfine devigita rezigni pri sia membreco en amatora, sed prestiĝa ĥoro. Kiam ŝi al kolegoj plendis, tiuj simple taksis ŝin grumblulino.

Helpe de sia sindikato, sinjinoro Bland procesis kontraŭ dunganto ŝia – urba administreto de nord-angla urbo Stockport [Stokpt]. Laŭ brita leĝaro, dunganto dungiton devas ŝirmi kontraŭ laborlokaj akcidentoj, damaĝoj, k.s. – kaj sinjinoro Bland argumentis ke, pro ŝia mizera sanstato kaŭzita de cigaredofumo, mankis la de ŝi atendita ŝirmado flanke de la magistrato.

Jen la unua fojo en Britio, ke viktimo de t.n. pasiva fumado sukcese procesis kontraŭ dunganto. Bonvenigis la rezulton i.a. la direktoro de brita kontraŭfumada asocio ASH, kiu antaŭvidis sinsekvon de tiaj procesoj. Al dungantoj li konsilis: „Senfumejojn nepre establu: se ne, venontfoje estos vi, kiu viktimojn de pasiva fumado kompensas.”

Paŭlo GUBBINS



PIRENEOJ

La urso kiel helpo al turismo



En Francio, kvankam amas-elmigrado pli kaj pli minacas la tradician kamparan vivon, tamen, samtempe alportas profiton kaj esperon la lastatempa turisma ondo. Bone ekzempligas tiun esperon la iniciato de kvar pireneaj vilaĝoj, kiuj formis komunan komitaton sub la devizo „protekto de hereda posedaĵo” kaj kun la urso kiel simbolo.

Simbolo ja signifa, ĉar ĝuste tiun beston oni preskaŭ ekstermis en tiu monta regiono. Jam en 1980 oni nombris nur dekursojn en la francaj Pireneoj kaj en 1985 la cifero falis al kvin. Kulpas pri la ekstermado ŝafbredistoj, malgraŭ ke la regiona instanco ja kompensas ilin kontraŭ ŝafoj voritaj de ursoj.

En Italio, male, en la abruza regiono la urson oni protektas kaj profitigas, starigante ŝtatparkon, kiu estas hejmo por 30000 loĝantoj kaj 100 ursoj. La projekto altiras jare milionon da turistoj. Jen projekto, kiu estas modelo por unu el la kvar pireneaj vilaĝestroj, kiu elvokas la memoron de la pasinta jarcento, kiam en la francaj Pireneoj kunvivis harmonie brutbredanta loĝantaro centoble pli granda kaj ursaro dekoble pli granda.

La itala modelo estus reproduktebla en Francio per la importado de ursoj el Bulgario. Feliĉe ankoraŭ abundas en la altaj valoj de la francaj Pireneoj musteloj, aproj, meloj, kapreoloj kaj sovaĝaj katoj.

Alberto SOLARZ


EKOLOGIO DE LA SPACO

Spacovrakoj

La diversaj restaĵoj en la ĉirkaŭtera spaco de la multnombraj satelitoj kaj spacoŝipoj, inkluzive de ties elĵetitaj rubaĵoj, konsistigas fatrason danĝeran por la ĝis nun 400 utilaj satelitoj. La danĝero estas tiom reala, ke jam usonaj spacoŝipoj devis manovri por eviti koliziojn.

En la germana urbo Darmstadt kunvenis lastatempe por pritrakti ĉi tiun problemon, specialistoj el la tuta mondo. Ili konstatis, ke danĝero jam agnoskita povos kun la tempo nur kreski. Dum restaĵoj en la malalta atmosfero rapide konsumiĝas, falante pro la altiro de la gravito, tiuj je pli grandaj altecoj povas resti tie dum tre longaj periodoj. Oni kalkulas, ke materialo je 600 km povas daŭri 30 jarojn, je 2 000 km 20 000 jarojn kaj je 36 000 km – ekzemple telekomunikaj satelitoj – milionojn da jaroj. Oni jam konsideras la neceson blendi estontajn spacoveturilojn kontraŭ ĉi tiuj „vrakoj”, kaj eĉ konsideras ankaŭ lanĉi dragilojn por amasigi kaj detruigi surloke la fatrason, sed kaj la tekniko kaj la mono estas aktuale obstakloj nesupereblaj. Dume laŭ kalkuloj flosas super ni ĝis 100 000 spacovrakeroj.

Alberto SOLARZ



Jaroj de intensa spac-esplorado kreis grandegan rubaĵdeponejon de plej altvaloraj teknikaĵoj ĝis nun nerecikleblaj.



Bona novaĵo: Joĉjo kaj Grenjo ne plu povos erarvagadi!

KEMIO

Dolĉaj esperoj

Ĉiuj dietantoj, kiuj maltrankvile rigardas teleron da kukoj aŭ skatolon da bombonoj, timante, ke la malpermesataj sukeraĵoj de la nuntempo venkos super la sopirata gracia korpo de l' estonto, ĝojos pro anonco pri la eltrovo de nova kategorio de dolĉigiloj. La ne-jonaj polihidroksaj substancoj strukture similas al sukeroj (vidu la ilustraĵon), kaj havas similajn fizikajn kaj kemiajn ecojn, sed montras unu tre grandan diferencon: ŝajne la korpo ne kapablos metaboli ilin por tiel ricevi la enhavatajn kaloriojn. Komencaj provoj en bakterioj montris, ke la organismoj ne kapablas fermenti la sukermimantojn.

La eltrovo okazis ĉe la laboratorioj de la usona firma NutraSweet [Nutrasüit], kiu produktas la samnoman kaj vaste uzatan dolĉigilon. Kial do necesas pliaj dolĉigiloj, kiam jam ekzistas kelkaj? La respondo troviĝas ne en la dolĉeco de la novaj substancoj. Efektive, ili estas nur 10-50 % tiom dolĉaj kiel sukero, kaj necesas aldoni ekz. sakarinon por egaligi la

dolĉecon de sukero. Temas pri la fizikaj kaj kemiaj ecoj de la novaj kandidatoj. La uzo de sukero en kuirado baziĝas ne sole sur ĝia dolĉeco. Sukero malaltigas la temperaturon je kiu likvaĵo solidiĝas, tiel permesante la konservon de likveco de kelkaj manĝaĵoj je ĉambra temperaturo. Cetere, sukero malhelpas la ĝeliĝon de farunaĵoj en bakanta kuko; la fenomeno okazus je 65°C en la malĉeesto de sukero, ekzemple, kaj je 93°C kun ĝi. Tia prokrasto estas bezonata, por ke la kuko atingu sian ĝustan formon. Sukero grandparte kontribuas al la tuta volumeno de kukoj, biskvitoj, glaciigitaj desertoj kaj bombonoj; tiaj manĝaĵoj kutime konsistas 30-95-elcente el sukero kaj ili estas pro tio altkaloriaj. La sukermimantoj tial minimumigus la dikigecon de tiuspecaj tentaĵoj.

Bridu, tamen, vian ĝojon, kaj kuraĝigu vin al plua sindeteno! Kiel ĉiuj novaj substancoj, kiujn oni celas uzi en manĝaĵoj, la sukermimantoj devas trapasi longan serion da provoj pri ilia sendanĝereco. La Nutrasweet-firmo opinias, ke la produktaĵoj ne surmerkatiĝos ĝis post almenaŭ kvin jaroj.

Krys UNGAR

TEKNIKO

Mirinda grimpulo

Kiam likas tubosistemo kaj oni ne scias kie en vasta reto da tuboj, ofte estas terure kosta afero, trovi kaj ripari tian difekton. Se ekz. temas pri subsurfaca tubaro, oni devas elfosi ĉion por iam trovi la ĝustan lokon.

Tian penan serĉadon nun konsiderinde plifaciligas iu besteto kun la nomo „tubogrimpulo”. Kompreneble oni tro-




Similas iomete al vermego: la tubogrimpulo (en vitra tubo). Dekstre oni vidas la lenson de la kamerao, per kiu la inspektaparato komunikas trovon de difektoj en iu tubo.


vas ĝin nek en sovaĝejo nek en zooloĝia ĝardeno, ĉar tiun nomon la inĝenieroj de l' germana kompanio Siemens donis al komplika elektronika aparato, inventita de ili. Ĝi estas vere mirinda, telestirata inspektaparato por ĉiuspecaj tubaroj, ekz. en elektrocenraloj, kemifabrikejoj aŭ gasoduktoj. Nenion pretervidas ĝia atentema okulo: kamerao kiu aŭ registras ĉion sur kunportata vidbendo aŭ rekte komunikas al la monitoro de la inspektotemo. La grimpulo sukcesas traŭri ĉiujn tubojn kun diametro pli granda ol 10 cm, supreniras eĉ en vertikalaj tuboj kaj kapablas iri suben ĝis maksimume 70 metroj.

Kiam, helpe de la tubogrimpulo oni ekzakte scias, kiuloke troviĝas difekto, la teknikistoj plu ne perdos tempon kaj energion, sed povas tuj entrepreni riparadon.


Stefan MAUL



LA SUKERMIMANTOJ



GLUKOZO



FRUKTOZO

SKANDINAVIO

Financkrizo

Kontraŭe al Danlando, la najbaraj nord-eŭropaj landoj Norvegio, Finnlando kaj Svedio ankoraŭ ne estas membroj de la Eŭropa Komunumo (EK). Post kiam ili kandidatiĝis pri membreco, ekonomia krizo kiu trafis ilin komence de la 90aj jaroj, venis tre maloportune. Ĝi estas parto de internacia krizo, sed havas ankaŭ naciajn elementojn.

Bankokrizoj

Financaj kaj valutaj krizoj estas komuna eco por ĉiuj tri landoj. En Norvegio oni malregulis la kreditmerkaton meze de la 80aj jaroj. La unuaj signoj de krizoj en la norvega banksistemo venis en 1987, kiam la rezultoj de la bankoj malboniĝis. Tion kaŭzis kaj malgrandigitaj enspezoj, kaj kreskantaj perdoj je elpruntoj, kiujn la pruntintoj ne povis repagi aŭ amortizi. En la periodo 1987-1990 dek du ŝparbankoj kaj tri komercaj bankoj ekhavis akutajn problemojn, ĉar la perdoj je elpruntoj atingis tian nivelon, ke la propra kapitalo estis aŭ perdita aŭ tiom reduktita ke la bankoj ne povis garantii sian likvidecon. Somere 1991 la situacio akriĝis kaj la 17an de oktobro samjare la registaro prezentis kontraŭkrizan proponaron al la parlamento. Pluraj bankoj bezonis kapitaldonon. Inter la 19a de aŭgusto kaj la 20a de decembro 1991 la ŝtato pere de la Ŝtata Bankgarantia Fonduso elspezis 11,6 miliardojn da kronoj en kriz-operacioj.

La norvega bankokrizo kulminis en 1991. Oni sukcesis solvi ĝin en tiu senco ke oni ankoraŭ havas funkciantan banksistemon. Sed la karaktero iom ŝanĝiĝis. La ŝtato nun ne nur respondecas pri la ekzisto kaj stabileco de la banksistemo. Ĝi ankaŭ, pli malpli kontraŭvole, posedas grandan parton de ĝi.

Kio kaŭzis la norvegan bankokrizon? La ekonomia evoluo estas ĉiam influata de multaj interligitaj faktoroj. Ni montru kelkajn. Unue, post la malreguligo de la kreditmerkato meze de la 80aj jaroj, la bankoj vidis eblon ekspansii. Troviĝis sufiĉe da pruntemuloj, ĉar estis sufiĉe alta inflacio kaj malaltaj realaj interezoj. Pruntoj estis donataj al tro riskaj investprojektoj. Tio montriĝis precipe kiam la ekonomia politiko estis ŝanĝita por malgrandigi la aĉetpovon. Tiam multaj faritaj investoj montris sin eraraj. La nombro da bankrottoj pli ol triobliĝis inter 1986 kaj 1989.

En Svedio krizo en la financa sistemo aperis kelkajn jarojn pli malfrue ol en Norvegio. La sveda krizo havas similajn sed ne identajn trajtojn. Oni malregulis la kreditmerkaton meze de la 80aj jaroj, same kiel en Norvegio. La bankoj kaj la financaj korporacioj volis ekspansii kaj agrese merkatadis siajn servojn. Komence, la inflacio estis alta kaj la reala interezo, post imposto, malalta. Tio stimulis pruntadon. Kiam la impostsistemo estis ŝanĝita tiel kene plu estis tiom avantaĝe prunti monon, kaj kiam la konjunkturo kaj la inflacio malsupreniris, pruntintoj venis en malfacilaĵojn.

La sveda bankokrizo estas en pli alta grado ol la norvega ligita al la dommerkato. Proksimume tri kvaronoj de la bankaj perdoj je elpruntoj rilatas al domoj. Temas precipe pri kreditoj donitaj en 1989 kaj 1990, kiam la prezoj de domoj estis ekstreme altaj sed baldaŭ falontaj. La perdoj estis tiel grandaj ke la ekzisto de pluraj bankoj estis minacata. Tial la registaro en oktobro 1992 sentis

sin devigita proklami ŝtatan garantion por konservi la konfidon al la bankosistemo. Tiu garantio implicas interalie ke la ŝtato garantias la depaŝojn de la bankaj klientoj.

En Finnlando la bankokrizo komenciĝis pli malfrue ol en Norvegio kaj Svedio. La finnlanda ekonomio kreskis rapide en la 80aj jaroj, sed ĝi stagnis en 1990. En 1991 la malneta nacia produkto malkreskis je 6,5 %, kaj en 1992 je 3,5 %. Estis pluraj kaŭzoj de la falo. Post kelkjara malregulado de la kreditmerkato entrepenoj kaj multaj homoj havis grandajn ŝuldojn. Ili en la fino de la pasinta jardeko komencis solidigi sian financan staton kaj aĉeti malpli ol antaŭe.

Al la regreso kontribuis ankaŭ la kolapso de la komerco kun la antaŭa Sovetio. En 1990 13 % de la eksporto iris tien, en 1991 malpli ol 5 procentoj.

Sekve de la ekonomia regreso kaj altaj interezoj, en 1991 pluraj pruntintoj ne povis plenumi siajn repago-devojn. La bankoj devis registri 1,5 % de la stoko de la pruntoj kiel perdojn. En 1992 tiu nombro kreskis ĝis 4,8 %. Same kiel en Svedio kaj Norvegio, la finnlanda ŝtato devis interveni en la banksektoro kaj eĉ transpreni la posedon de kelkaj bankoj.

Valutoj falis

La tri landoj ne sukcesis konservi siajn valutokurzajn en la ŝtormo kiu regis en la eŭropa valutomerkato en 1992. La kombino de liberigitaj

Kruktabelo

supra cifero: kurzo en aprilo 1993
suba cifero (inter krampoj): kurzo en februaro 1992

unu → valoras ↓	DEM	FIM	NOK	SEK	USD	ECU
DEM		0,294 (0,367)	0,236 (0,255)	0,218 (0,275)	1,580 (1,604)	1,955 (2,043)
FIM	3,399 (2,722)		0,904 (0,694)	0,741 (0,750)	5,370 (4,372)	6,647 (5,563)
NOK	4,229 (3,923)	1,244 (1,440)		0,922 (1,080)	6,681 (6,293)	8,270 (8,105)
SEK	4,586 (3,634)	1,349 (1,334)	1,084 (0,926)		7,244 (5,829)	8,968 (7,424)
USD	0,633 (0,623)	0,186 (0,229)	0,150 (0,159)	0,138 (0,172)		1,238 (1,274)
ECU	0,511 (0,490)	0,150 (0,180)	0,121 (0,125)	0,112 (0,135)	0,808 (0,785)	

DEM = germana marko; FIM = finna marko; NOK = norvega krono; SEK = sveda krono; USD = usona dolaro; ECU = ekuo

translimaj valutaj fluoj kaj fiksjaj valutokurzoj montriĝis esti tre malstabila sistemo. La, pro atendata devaluto, fluo de valutoj trans la landlimojn estis pli granda ol oni antaŭvidis kiam oni liberigis la valutofluojn.

Finnlando devalutis je 12,3 % en novembro 1991. Sur la merkato oni atendis pluan devaluton, kaj grandskale volis ŝanĝi finnajn markojn al pli fortaj valutoj. En septembro 1992 la premo estis tiel forta ke la deviza rezervo elĉerpiĝis, kaj la centra banko devis forlasi la fiksan kurzon de la marko kaj lasi ĝin fluktui. En marto 1993 la finna marko estis perdinta preskaŭ 30 % de ĝia valoro kontraŭ la ekuo, kompare kun la situacio antaŭ la devaluto en 1991.

La 17an de majo 1991, la sveda krono per unuflanka sveda decido estis ligata al la ekuo, tiel ke unu ekuo egalas al 7,40054 kronoj, ± 1,5 %. Tio estis tro alta valoro de la krono. Konsiderante la problemojn en la sveda ekonomio, precipe grandan deficiton en la ŝtata buĝeto, la „merkato” ne fidis la kapablon de la sveda centra banko konservi la kurzon. En septembro 1992 – tuj post la falo de la finna marko kaj iom antaŭ la falo de la brita pundo – okazis la unua fortega atako kontraŭ la kronon. Por malhelpi la elfluon de valuto, la centra banko respondis per altigo de la t.n. marĝena interezo en kvar paŝoj, de 16 ĝis 500 %! Tio savis la kronon, sed nur provizore kaj je altega kosto. Post nova atako en novembro, la sveda centra banko devis kapitulaci kaj forlasi la fiksan kurzon de la krono. En aprilo 1993 la krono estis perdinta ĉirkaŭ 20 % de sia antaŭnovembra valoro en ekuoj.

Ankaŭ la norvega krono ne restis netuŝita kiam la eŭropaj valutoj falis kiel domenbrikoj. La 10an de decembro 1992 estis ĝia vico. Oni devis tiun tagon rezigni la dujaran litigon je la ekuo kaj lasi la kronon fluktui pli malpli libere.

Nestabila sistemo

La okazaĵoj sur la valutomerkato konfirmas ke estas tre malfacile teni sistemon de fiksjaj valutokurzoj kaj liberaj translimaj valutofluoj. Du alternativaj sistemoj ambaŭ estus pli stabilaj: unue, fiksjaj kurzoj en kombino kun reguligitaj translimaj valutofluoj; due, fluktujaj kurzoj en kombino kun liberaj translimaj fluoj. Post kiam oni politike decidis pri liberaj translimaj valutofluoj, „la merkato” devigis la eŭropajn ŝtatojn preni ankaŭ la duan paŝon en direkto al la dua sistemo.

Bo SANDELIN

EŬROPA KOMUNUMO

Ĉu ankaŭ fiska komunumo?

Komence de 1993 ankaŭ Germanio – kiel lasta granda lando de la EK – enkondukis regularon laŭ kiu bankoj aŭtomate retenu parton de la elpagata rento kaj rekte pagu ĝin al la fisko. Ŝparantoj kiuj nur havas malgrandan kapitalon estas tute aŭ aparte liberigitaj de tiu aŭtomata reteno.

Kiel antaŭvidite, la riĉuloj amase translokis sian kapitalon al landoj kie ne ekzistas tia imposto, precipe Svislando kaj Luksemburgo. Sekve la germana ŝtato, kiu urĝe bezonas pli da enspezoj, enkasigos nur parton de la sumo kiun ĝi esperis ricevi.

FISKA RETENO EN EŬROPO (%)

	enloĝantoj	eksterlandanoj
Danlando	0	0
Belgio	10	0
Germanio	30	0
Francio	15-35	0
Irlando	10-27	0
Italio	12,5-30	0
Luksemburgo	0	0
Nederlando	0	0
Grekio	16	0
Portugaliao	20-25	20-25
Hispanio	25	0
Britio	25	0
Svislando	35	0

La fenomeno ne estas nova. Riĉaj francoj jam delonge deponas kapitalon en Svislando, belgoj en Luksemburgo, nederlandanoj en Belgio, britoj en la insuletoj kiuj ĉirkaŭas la insulon, ktp. La leĝofarantoj ja estas iom hipokritaj: enloĝantoj kutime jes devas pagi imposton je rento, eksterlandanoj ne. Cetere, profitante de mankoj en la leĝaro, bankoj trovis metodojn por tute laŭleĝe investi monon en propra lando sen pagi impostojn.

Laŭ pluraj onidiroj jam post kelkaj monatoj estos unueca regularo por la tuta EK, tiel ke ne plu utilis deponi sian monon en najbara lando. Solvo ne nur estas urĝe bezonata pro la malplenaj kasoj de la ŝtatoj, sed ankaŭ pro malkontento de multaj civitanoj kiuj ne estas sufiĉe kleraj aŭ riĉaj por povi eviti la imposton kaj ĝui la sekvantajn profitojn.

Luksemburga oficialulo reagis al tio dirante ke unueca imposto je rento estas akceptebla por li, kondiĉe ke samtempe ĉiuj aliaj EK-landoj nuligu

la avantaĝojn kiujn ili donas al eksterlandaj investantoj. Aliaj opinias ke tuteŭropa aŭ eĉ tutmonda impostsistemo estas bezonata.

Intertempe la hipokriteco daŭras. Antaŭ kelkaj semajnoj granda belga banko punis oficiston ĉar li ne kontrolis la originon de grandaj monsumoj kiujn eksterlandano deponis ĉe li. Samtempe, luksemburga kaj svisa filioj de la sama banko anoncadis en germana gazetararo pri siaj favoraj (komprenu: senimpostaj) investebloj.

Roland ROTSAERT

Milionoj de eldonitaj kreditkartoj
1987 en la mondo 1991



Visa-kreditkartoj estas plej popularaj; ilia nombro preskaŭ duobligiĝis dum la pasintaj 4 jaroj. En dua loko sekvas Eurocard kiu havas malpli rapidan kreskon. American Express kaj Diners Club celas al malgranda, elita publiko.

Tiuj ciferoj konfirmas la rezultojn de la enketo ĉe la legantoj de MONATO en 1992. Pli ol triono de la respondintaj MONATO-abonantoj posedas kreditkarton. 77 % elektis Visa-karton kaj 18 % Eurocard.

Aliaj kartoj estas maloftaj. Menciinde estas ke 17 % de la abonantoj havas plurajn kreditkartojn. RR

Bahaso

BAHASA



Por tiuj kiuj interesiĝas pri la demando, ĉu kaj kiel povas funkcii interlingvo inter parolantoj de diversaj lingvoj, bahaso estas fascina studobjekto, ĉar ĝi en realo jam plenumas tiun rolon. Kaj por studanto, ĝi estas alia ekzemplo de „du lingvoj por la prezo de unu”: la indonezia (*Bahasa Indonesia*), kaj la malaja (*Bahasa Malaysia* [Malajzia] – ankaŭ parolata en Brunejo, sur la insulo Borneo, en Singapuro, suda Tajlando, kaj sudaj Filipinoj). Entute ĝi havas ĉirkaŭ 135 milionojn da parolantoj. La diferencoj inter malaja kaj indonezia estas minimumaj, mi aludos la komunan lingvon ĉi tie per bahaso.

Bahaso estas la plej granda kaj grava membro de la vasta lingvofamilio malaj-polinezia aŭ aŭstronezia, kies etendiĝo de Paskinsulo apud Sud-Ameriko, pli ol duone ĉirkaŭ la terglobo, ĝis Madagaskaro apud Afriko, kaj ĝis Tajvano (Formozo) en la nordo, atestas pri la mirindaj vojaĝoj de la antikvaj aŭstronezianoj. Tiuj antaŭhistoriaj kosmovojaĝoj probable originis en Indonezio mem (aŭ eble en Filipinoj aŭ en suda Ĉinio). La lingvofamilio havas multajn vortojn kiuj restis nekredeble similaj, kiam oni memoras la grandegajn distancojn inter tiuj lingvoj. Ekzemple „okulo” estas en la malagaŝa (Madagaskaro) *maso*, en la indiĝena tajvana lingvo *macha*, havaja *maka*, dum *mata* en Rapanui (Paskinsulo),

tahitia, rarotonga, maoria (Novzelando), samoaja, tonga, fiĝia, Motu (Novgvineo), Pilipino kaj bahaso, *mata*.¹ Bahaso originis en la malaja duoninsulo. Komercistoj disvastigis en la 15a jarcento simpligitan piĝinan specon de ĝi tra la indonezia insularo, nomata *Melayu pasar* (*pasar* signifas ‚bazar’ kaj parencas al ĝi). Por anstataŭigi la kolonian nederlandan lingvon, indoneziaj patriotoj formis el pli beletra malaja dialekto, unu el la plej novaj lingvoj en la mondo, la indonezian, unue uzatan en 1927. Kiam Indonezio fine sendependiĝis en 1949, ĝi deklaris tiun lingvon oficiala ŝtata lingvo. Indonezio havas nekredeblan kvanton de pli ol 300 lingvoj. Krom en Irian Jaya [Ĝaja] (okcidenta Novgvineo), la plimulto el ili ankaŭ estas aŭstroneziaj. Unu el ili, la java, mem estas unu el la plej grandaj lingvoj en la mondo, kun ĉ. 55 milionoj da parolantoj, kaj „malgranda” java lingvo, la sunda, mem nombras 21 milionojn. Kio malebligis, ke Indonezio iĝu java imperio, estas la origine ekstera, do ‚neŭtrala’ liglingvo *Bahasa Indonesia*, instruata en ĉiuj lernejoj. Por preskaŭ la tuta loĝantaro ĝi estas dua lingvo.

La granda avantaĝo de bahaso super la hejmlingvoj estas ĝia simplereco – kaj egalismo. Unu el la plej elstaraj ekzemploj de kontraŭa tendenco al elitismo en Indonezio, kaj

eble la mondo, estas la lingvo de la hindua insulo Balio. Pli ĝuste ni diru tri sociaj lingvoj, ĉar en realo ekzistas tie: altnivela speco por superaj kasto, malaltnivela por malsuperaj kasto, kaj meza speco aplikota ekzemple ĉe renkontiĝo kun fremdulo, almenaŭ ĝis kiam ties kasto estas firme determinita.

Ja ankoraŭ aliaj lingvoj konas diversajn nivelojn de ĝentileco. Sed en la balia eĉ ordinaraj vortoj estas diferencaj laŭ koncerna kasto. Plej strange, malaltkasta persono alparolas altkastulon en la **alta** lingvo, kiu estas plena de sanskritaj vortoj, dum altkasta homo alparolas malaltkastulon en ties **malalta** lingvospeco! Do, almenaŭ teorie, princo parolas la krudan lingvon al ĉiuj, ĉar li ja estas supera al ĉiuj! Kaj ĉiu por elmontri modestecon devas paroli pri si mem en la malalta formo. Kaj, kulmine ekzistas tie ankoraŭ kvara ‚predikista’ lingvaĵo – *kavi* (poezia) – eĉ pli sanskriteca ol la kutima. Kiam oni aldonas la indonezian kaj la daŭre pli prestiĝan anglan, balia klerulo ofte devos regi ses lingvojn!

Kompare kun lingvoj kia la balia kaj la (simile klaseca) java, bahaso estas mirige rekta kaj demokrata. Ĝi ne estas socitavola lingvo; ja oni apenaŭ uzas neŭtralan pronomon kiel nia zvi”. Komparu kun la situacio en Hindio priskribita en alia artikolo (MONATO 1993/6, p. 20), kaj observu

kiel la elekto de bahaso – anstataŭ la eble pli oportuna java – savis Indonezion de tiaj lingvokonfliktoj. En Malajzio kaj Singapuro, kontraŭe, kvankam ĝi estas indiĝena, la malaja ne estas neŭtrala, kaj la malajoj, ĉinoj, hindoĵoj kaj eŭropanoj uzas la anglan kiel internacian komunikilon. Pri ĝia gramatiko oni povas rakonti malmulte. Tiu posedas neniun deklinacion, konjugacion, genron, aŭ verbotempon, kaj tiel preskaŭ neniun fiksan gramatikan regulon! Se oni volas precizigi ekz. la tempon de iu okazaĵo, oni utiligas iun adverbos kiel *sudah* (jam) aŭ *belum* (ankoraŭ ne). Ne ekzistas artikolo, sed se necese oni povas utiligi *itu* aŭ *ini* (tiu, tiu ĉi) por nia „la”. Jen interesa paralelo kun la evoluo de „la” en latinidaj lingvoj (itala, franca, hispana, k.s.) el origina latina *ille*. Vortoj ne ŝanĝiĝas por pluralo; se necese oni anstataŭe simple ripetas la vorton: *buku-buku* = libroj. Ripetado estas tipe aŭstronezia lingvoprocedo, uzata ankaŭ por emfazo. Ĝenerale oni ne uzas vorton por esprimi „esti”. En *Bahasa Indonesia* adjektivoj distingiĝas nur ĉar ili lokiĝas post la substantivo, kiel en la nomo de la lingvo mem, do vortordo estas ege grava.

Alia tipe aŭstronezia trajto estas la ekzisto de du vortoj por „ni” unu kiu inkluzivas la adresaton, kaj dua kiu ne inkluzivas tiun. Do, se amikoj dirus al vi en unu el tiuj lingvoj: „Ŝi invitis nin al festo,” vi certus ĉu tio validas ankaŭ por vi aŭ ne.

Eble la plej komplika gramatika eco de bahaso por lernantoj estas ĝia uzado de verbaj prefiksoj kaj sufiksoj. Prefiksoj ofte ŝanĝas la komencon de la radika vorto, igante retrovon en vortaro (laŭ alfabeto ordo) sufiĉe malfacila.

Kiel en aliaj orientaziaj lingvoj, inter numeroj kaj substantivoj oni devas meti koncernen mezurvorton, ekzemple *dua carik* [ĉarik] *kertas* por „du pecoj {de} papero”. Iuj estas por ni iom strangaj; oni devas diri *lima buah prahoto*, laŭvorte: „kvin fruktoj {de} kamionoj”.

Fakte, la manko de gvidaj gramatikaj reguloj povas foje kaŭzi problemojn por lernantoj, kiuj deziras vere regi la lingvon, sed se oni postulas por mondlingvo plej simplan gramatikon, oni povas apenaŭ imagi pli simplan modelon ol tiun de bahaso! Estas proverbo, konsiderebla kiel devizo por tiu koncizeco de la lingvo: *Bergalah hilir, tertawa buayan* – „Remilas laŭflue, ridas krokodilo” = plenvorte „Se vi remas laŭflue, la krokodilo ridos pri vi”.

Kvankam ĝia ‚pura’ vortotrezoro aspektas fremda al eksterlandanoj, la

lingvo tamen havas amason da pruntvortoj: el sanskrito *singa* (leono), el araba *maaf* (ekskuzo), el portugala *meja* (tablo), el nederlanda *kantor* (oficejo), el angla *coklat* (ĉokolado).

Ĉu do oni povas trovi komplikaĵojn almenaŭ en la prononcado? Ne, ankaŭ ĝia sistemo de parolsonoĵoj estas tre simpla, preskaŭ parenca al tiu de Esperanto. Ankaŭ ne ekzistas signifodonaj tonoj kiel en la ĉina aŭ taja. Ĝi estas dolĉesona lingvo, kun mirinda kvanto de onomatopeaj vortoj, kiel la nomo de la ĉefa perkuta instrumentaro nomata *gamelan* – inter kiuj troviĝas *gung* (gongo), *gambang* (ksilofono), *celempung* (citro), *suling* (fluto), *bering-bering* (cimbaloj) kaj *lonceng* (sonoriloj).

La malaja frue skribiĝis per la araba skribo, maltaŭga por tiel vokalplena lingvo. La respektivaj koloniaj potencoj, Britio kaj Nederlando, donis al Malajzio kaj Indonezio iom diversajn latinajn alfabetojn, sed la du landoj konsentis en 1972 pri unuigita ortografio.

Hodiaŭ la diferencoj inter la malazia kaj indonezia estas malgrandaj, kompareblaj al tiuj inter la amerikaj kaj eŭropaj specoj de la hispana kaj angla. Iuj fontas en la koloniaj lingvoj, ekzemple la vortoj por la nocio „(aŭto)buso”: en Malajzio *bas* kaj en Indonezio *bis*, kio spegulas respektive anglan kaj nederlandan prononcojn.

Do, jen eble la plej taŭga kandidato por LA mondlingvo, se oni devus elekti el la kelkaj ĉefaj nacilingvoj. Ĝi estas simpla sed subtila, belsona kaj foneme skribata. Tamen la ecoj de lingvo ne nepre determinas ĝian sukceson, kaj malverŝajnas ke bahaso de ĝia angulo venkos la mondon. Ĝia sukcesa solvo de la lingvo-problemo almenaŭ devus esti inspira kaj instrua, se oni volas igi Esperanton liglingvo por la tuta mondo, kiel estas bahaso en Indonezio.

Bradley KENDAL

1. Oni tamen neniam tro haste konkludu pri tia parenceco sen apogo de pliaj, kaj prefere alinaturaj, konfirmoj. Ekzemple, ankaŭ la novgreka hazarde posedas similan vorton, $\mu\alpha\tau\iota$ por ‚okulo’, kaj tamen ekzistas neniu familia aparteno. (Red.)

Viajn kontribuojn por la rubriko „lingvo” sendu al:

Girvan MacKay
The Manse, Clonminch
Tullamore, Co. Offaly
Irlando

Ĉinaj ideogramoj en Koreio

Izumi Yukio faris kritikon en MONATO 6/92 kontraŭ Yamasaki Seikō, kiu priskribis la problemojn komplikantajn la literumán vivon de japanoj, per miksado de antikva ĉina ideografio kun japana propra literaro (MONATO 7/89). La kritikato „kreas nigran fabelon pri la ĉina ideografio” – „Eĉ pli bedaŭrinde estas prezenti nin azianojn, donante la impreson, kvazaŭ iaj senpekaj popolanoj deziregus senideografiigi sian lingvon”. Ordinare Izumi prezentas per ĉinaj ideogramoj sian nomon, dum Yamasaki per propre japanaj literoj. Same en Koreio du grupoj bataladas, eble eĉ pli forte ol tiuj en Japanio.

Koreaj litersistemoj

Koreoj havas la dubindan ĝojon posedi du apartajn skribosistemojn. Unu el ili estas propra, kaj la alia estas ĉina. La propra estas fonetika alfabeto *hankl* aŭ *han-gul* konsistanta el 24 literoj, konsonantaj kaj vokalaj, kiuj skribiĝas respektive per unu ĝis kvar streketoj. Ili estas vere facilaj por skribado kaj legado, ĉar ja sonoj kaj konceptoj ĉe skribaj vortoj en frazoj estas je unua vido kompreneblaj. Kontraŭe, la ĉinaj simboloj, uzataj en Koreio, konsistas el minimume 8000 de la entute 50 000 ideogramoj. Ili nomiĝas koree *hanca*, ĉine *hanzi*; ĉiu kun unu ĝis 66 streketoj! Vere parolataj sonoj kaj signifoj en ili estas ne klaraj, se oni ne nepre parkeras ĉiun ideogramon unuope kaj sufiĉe multajn kunmetitajn ideogramojn. Ekzemple, mi mem lernis *hankl* nur dum horoj en mia tria jaraĝo kaj baldaŭ kapablis legi koreajn novelojn kaj koreigitajn kanonojn, eĉ la seminariajn tekstojn de la patro. Poste mi lernis en mia kvina la ideogramojn, de konfuceana klerulo, kiu instruis min private antaŭ siaj genuoj dum kvin jaroj, sed pri tiuj mi forgesis multajn el la ĝustaj streketoj, sonoj kaj signifoj, ĉar ekzemple multaj simboloj aplikas intersimilajn streketarojn, reprezentas kelkoblajn sonojn kaj kovras ĝis dek kaj pliajn malsamajn konceptojn. Ili ja montras per si mem, nek la kon-

cernajn parolsonojn, nek la koncer-
najn signifojn, tiel ke multaj kleruloj,
eĉ tiuj kiuj aperadas sur TV-ekrano,
ilin ofte mistrafas, ve!

Kontraŭ ideogramoj

En la sendependiĝa jaro de Koreio
(1948), la regantoj kreis jenan leĝon:
La oficialaj dokumentoj estu principe
skribataj en *hankl*. Post tiu tempo,
nun jam preskaŭ duonan jarcenton,
preskaŭ ĉiuj lernolibroj, universitataj
tekstoj, profesoraj artikoloj, ĉiuj lite-
raturaĵoj, ĉiuj kantoj, ĉiuj gazetoj, eĉ
sciencaj, kaj ĉiuj eldonaĵoj de religiaj
grupoj (2/3 el la loĝantaro) plu ne
uzas ĉinajn simbolojn. Restas tamen
kelkdek mil oficistoj kaj komercistoj,
kiuj daŭre adoras la antikvan ĉinan
tradicion. En antikvaj tempoj oni ĝe-
nerale kredis, ke la ĉinaj ideogramoj
entenas ian magian forton por „for-
peli diablojn”; kelkiuj eĉ ankoraŭ
nuntempe tion kredas.

Dum du mil jaroj niaj kleruloj (t.e. re-
gantoj, penetritaj de konfuceanismo
kaj budhismo) devis dediĉi kvin ĝis
dek jarojn en sia junaĝo al lernado
de la fundamentaj ĉinaj verkaĵoj per
ĉina ideografio, nomante la proprajn
koreajn vortojn kaj alfabeton „mal-
noblaĵo”, kompareble al vulgara lat-
ino kontraŭ klasika latino en antikva
Eŭropo. Sed en la finaj kelkdek jaroj
de la 19a jarcento invadis nian „ermi-
tan serenlandon” maristoj kun pafil-
egoj, el malproksimaj landoj de Eŭ-
ropo kaj Ameriko. Tio instigis kore-
ajn patriotojn, inter kiuj So Ze-il
(1863- 1951) kiu eĉ studadis en
Usono, krei *Sendependa Ĵurnalo* en
Seulo (1896), kompostatan per nur
la korea alfabeto, spite la kondam-
nojn de potencaj konfuceanoj. Kaj la
unua lingvisto moderna, Cu Si-kjong
(1876-1914) „renesancigis” la alfab-
eton kaj gramatikon, dum ankoraŭ
preskaŭ ĉiuj regantaj kleruloj plu
premis la popolon adoradi la ĉinan
skribosistemon.

Post tiu ekflora epoko, bedaŭrinde
venis la koloniisma japana okupacio
de post 1910, dum kiuj la japanoj
malpermesis uzadon de la korea al-
fabeto kaj eĉ de la korea lingvo, pu-
nante uzantojn kaj parolantojn de la
denaskaj lingvo kaj literaturo, eĉ per
mortpuno. Sub la „reeduka” politiko
de Japanio, kiu mem favoras kelk-
dek mil ĉinajn ideogramojn kun la
propra *kana*-simbolaro el 92 ele-
mentoj, koreoj estis sisteme japanig-
ataj. Tamen, tenace la koreoj travivis
kun siaj literoj kaj lingvo, sub la vi-
poj. Sed rezulte, ankoraŭ nun plipar-
to el la terminoj en ĉiuj kampoj de la
socia vivo konsistas el japanaj vortoj
skribataj per ĉinaj ideogramoj, sed
sone diferencaj de la japanaj. Feliĉe

koreaj fakuloj aktuale, en ĉiuj kam-
poj – kuracado, juro, komerco, ĉar-
pentado, presado, fiŝkaptado, tea-
tro, arto, muziko, natursciencoj, ktp.
– laboradas por anstataŭigi la frem-
dajn terminojn per pli facilaj propre
koreaj vortoj kaj *hankl*-skribo.

Hodiaŭ jam milionoj da komputiloj
funkcias per la korea kaj aliaj alfab-
etaj programoj, ĝis dekoble pli rap-
idaj ol tiuj kiuj provas utiligi la 6000
ideogramojn ĉinajn. Ĉu eŭropanoj
tiel povus pioniri en alfabeto simpl-
eco, se ili redonus ĉiujn tekstojn per,
ekzemple, egiptaj hieroglifoj kun siaj
arkaikaj elparolo kaj signifo?

Kvankam la entreprenistoj de ĵurna-
loj ankoraŭ emas resti fidelaj al ĉinaj
ideogramoj, kontraŭe al la kuranta
erao, pro sia junaĝa edukiĝo sub ja-
pana regado, tamen ili mem ĉiuoka-
ze uzadas aktuale nur *hankl*, sed
dume en la publikeco ili forstrekig-
emas tiajn vortojn, skribitajn de siaj
frontaj raportistoj junaj, edukitaj sub
la leĝo pri ekskluziva uzado de la
nacia literaro, dekretita en 1948, ĉar
jen la nova epoko de la literaturo.

Ekde 1945, pro la kapitulaco de Ja-
panio, el ties malliberejoj multaj libe-
rigitaj koreaj lingvistoj radikale oku-
pis la oficejojn pri edukado, kaj im-
presege lumigas per nur *hankl*-alfa-
beto la tutan popolon. Danke al tio,
la analfabeteco abrupte malkreskis,
tiel ke dum nur malmultaj jaroj ĝi fa-
lis de 90 % al 15 %.

Por ĉinaj ideogramoj

Ideogramistoj persistas batali kon-
traŭ hanklistoj, kuraĝigitaj de la japa-
na ideogramskolo, ke oni plu instru-
u ĉinajn simbolojn, ĉar la ĉinaj en tute
da koreaj vortoj okupas 3/4; kaj ili
plendas, ke ĉiuj lernolibroj elementaj
ĝis tekstoj universitataj sen ideogra-
moj, faras junulojn malkleruloj tiel,
ke eĉ edukitoj en universitatoj „blin-
digite” plu ne kapablas legi period-
aĵojn kun kelkaj *hanca*. Laŭ la korea
lingvo-literatura eduka asocio, ĝia
testo pri ideogramoj atribuas mez-
nombre 54,25 poentojn al ĉinaj en
1992, kontraŭ 76 en 1990; kaj ne
kapablaj skribi siajn universitatno-
mojn per ĉinaj simboloj 47%.

La adorantoj de ĉina tradicio pledas,
ke la ĉina skribosistemo estus tiel
logika, ke ĝi estus facile lernebla, kaj
trejnus la pensokapablon. Ili asertas
ke ideogramoj helpas konscii no-
ciojn en la frazoj, sen kiuj neniu
komprenas plene. Koreaj vortoj male
entenas multe da homografaĵoj kaj
homonimoj, se tradukitaj el la ĉina.
Ekzemple, malsamformaj estas 140
por nur unu sama sono (*ka*), 297 por
nura *i*, 355 por *sa*. Pro la korea alfa-
beto cent malsamaj personoj portas

identan nomon en la telefon-adres-
aro. Por diferencigi tiajn komplek-
sojn nepre oni apliku ideogramojn.
Jen la bedaŭrinda rezulto de rigida
kutimego de kelkmil jaroj. Nelernado
de la ĉinaj simboloj krome izolus ko-
reojn el la komunumego orienta,
kies 2 miliardoj da homoj ja uzas la
ĉinajn. Sed oni malatentas, ke la el-
parolo de tiuj ideogramoj estas mal-
sama laŭ la landoj, tiel ke multaj „di-
alektaj” elparoloj estas tute ne inter-
kompreneblaj, eĉ ne en Ĉino mem!
La interkompreniĝo estas sekve nur
skriba, tiel dire „penikparolada”. Kaj
ju pli da koreoj uzas sian propran li-
teraron, des pli efike renaskiĝas an-
kaŭ koreaj etnaj vortoj, forgesitaj pro
la influo de fremda skribosistemo.
Won Kwang-ho, juna parlamentano
opozicia, donacis el propra poŝo al
la parlamento la nomplatojn de ĉiuj
ĝiaj anoj en pure korea skribo, por
anstataŭigi la ĝistiamajn ĉinskribajn.
Sed bedaŭrinde la prezidanto ne ak-
ceptis kaj forĵetis ilin en kelon.

Ĉe la Konstitucia Juĝejo, maljunaj
ideogramistoj eks-altrangaj akuzas
la lernolibrojn, kompilitajn monopole
de la registaro, pretekste, ke la in-
struado per nur *hankl* sen ideogra-
moj, kontraŭus al artikolo de la na-
cia konstitucio, laŭ kiu ĉiuj nacianoj
ĝuas la rajton pri edukado. (Ĉu oni
do akuzu en okcidento lernoprogra-
mojn, ke en ili malaperis grekaj eti-
moj, skribitaj per arkaika literaro, aŭ
latinaj vortoj per gotika skribo?)

La plene fonetika – t.e. tutkonforma
al la reala elparolo – alfabeto korea,
kreita en 1442 fare de reĝo Sezong,
ankoraŭ daŭre devas defendi sin spite
la motivon por ĝia kreo, jene for-
mulita de la reĝo: „Ĉar nia lingvo di-
ferencas de la ĉina tiel, ke malkleraj
popolanoj ne kapablas prezenti fac-
ile sian opinion, mi distribuas jenan
novan literaron.”

Kontraŭ tiu „ĝusta sono” jam de pli
ol 500 jaroj luktas la ĉin-adorantoj,
persekutante ĝin per ĉiaj rimedoj.

AHN Song-san

Esperanto = Interlingvo?

JES!

Ĉar nun ekzistas la

HUNGARA LINGVOKURSO

*Enkonduko kaj kurso pri tiu
finn-ugra lingvo, kun multaj
klarigoj, tekstoj ekzercoj kaj
plena vortlisto.*

*Mendu ĝin ĉe FEL (810 Belgaj
frankoj + afranko) aŭ ĉe via kutima
libroservo.*

Enigma romano

Koncizan konigon verki pri tiu ĉi romano ne eblas. Multaj eventoj, multaj rolantoj, multaj scenejoj. La realo ĉiam miksiĝas kun la mistiko. Tempo kaj spaco ne baras la agadojn. En la historion de la majstro kaj Margarita estas teksita aparta romano: la verko de la majstro pri la kondamno kaj ekzekuto de Jesuo, pri Pilato kaj ties puno. T.e. apokrifa trakto de biblia historio.

La ĉefrolanto de la unuaranga romano estas Voland, la satano, kiu aperis en Moskvo en la komenco de la tridekaj jaroj kun siaj akompanantoj: Kerubjev, Behemot – la grandega kato – kaj Azazello. Dum kelkaj tagoj ili tute perturbis la vivon en Moskvo. Unue ĉefredaktoron Berlioz trafis enigma, morta akcidento. Pluraj malaperis, kaj multaj iĝis viktimoj de prestidigito. Poste Satano aranĝis balon, por kies reĝino li elektis Margariton, la amikininon, muzon, instiginton de la majstro. Margarita ne sciis, kie li estas, eĉ ne, ĉu li vivas. Kun Satano ŝi entreprenos la kunlaboron nur se li redonos al ŝi la majstron. Margarita iĝis sorĉistino, rajdante sur balailo ŝi punis ĉiun, kiu nocis al la majstro, kaj partoprenis sorĉistinan kunvenon. Reveninte en Moskvon, ŝi akceptis la gastojn de la balo antaŭlonge ekzekutitajn, famajn murdintojn, krimulojn. Mem la balo estis sabat-orgio, nigra meso. Por balkulmino, Voland, el la fortranĉita kapo de Berlioz, sorĉis pokalon, kaj en ĝin li fluigis la sangon de la murdita fidenuncisto, eksbarono, kaj post kiam li trinkis, li transdonis ĝin al Margarita. Sed ĉe la unua gluto aŭdiĝis kokokrio, kaj la balo finiĝis. Pro la ripetita peto de Margarita Voland sorĉis tien la majstron, kaj permesis, ke ili restu kune. Antaŭ la forlaso de la urbo, aperis Mateo, la disĉiplo de Jesuo, iom diskutis kun Voland, poste eldiris, ke Jesuo legis la romanon, kaj petis ke pro la romano la majstro kune kun Margarita estu rekompencita per kvieto. Voland promesis tion. Azazello murdis ilin per veneno. Ilia animo, kiel vivuloj flugrajdis sur monteton apud Moskvo, kie Voland atendis ilin. Adiaŭinte la urbon, ili kune forrajdis. Dume ĉiuj transformiĝis en sian originan formon. La grupo haltis sur rokplataĵo, kie sur ŝtoneĝo jam preskaŭ du mil jarojn sidis Pilato. Ĉe lunlumo turmentis lin sendormeco, sed kiam li dormis, ĉiam sonĝis, ke

diskutante li promenadas kun Jesuo, kaj klopodis konvinki lin, ke la ekzekuto ne okazis. Margarita petis Volandon, ke li liberigu Pilaton. Li plenumis la peton, kaj Pilato sur lumvojo kuris al Jesuo. Voland post adiaŭo kun siaj akompanantoj malaperis en abismo. La majstro kaj Margarita ekiris al sia eterna restadejo, en bela ĝardeno, kun florantaj ĉerizarboj, por resti tie por ĉiam kune, kaj aŭskulti la muzikon de Schubert.

Kion volas diri tiu ĉi arte eminenta konstruita romano? Sendube ĝi ebligas rigardon en la tiutempan moskvan vivon. Homoj abrupte malaperas, suspekto, intrigoj, kunloĝado de pluraj familioj en la sama loĝejo, klopodo por akiri valutojn, ties konsekvencoj, luksa vivo por privilegiaj, agado de la sekreta servo, ktp.

Oni povas trovi konsiderindajn pensojn, ekz. en la diskuto de Mateo kun Voland. Aŭ ĉu Bulgakov tiamaniere volis kontrabandi biblian historion en la tiutempan literaturon? Eble li volis sugesti ke supernaturaj potencoj ekzistas, kaj kiu neas tion, ne evitas la punon? En la romano ĉiuj nekredintoj estis punitaj, sed kiuj emis kunlabori, tiujn Voland rekompencis. Por Voland estis grava informo, ke plimulto de moskvanoj estas nekredantoj. Por kredigi ilin, li aranĝis tiun teatran spektaklon, kies titolo estis „Seanco de nigra magio kun ties plena senmaskigo”. Nu, senmaskigo tute ne okazis. Ekleginte la epilogon, oni komencas esperi, ke finfine la multaj strangaĵoj estos klarigitaj, sed anstataŭ tio, per la daŭrigo de la historio de la iama poeto, plu daŭras la mistikaĵoj.

La tradukinto faris eminentan laboron. Li klopodis fidele transplanti la nekutimajn bulgakovajn frazojn, en kiuj foje-foje li uzis vortojn, de li kreitajn. La tradukinto sukcesis. La esperantaj frazoj estas klaraj, kompreneblaj. Multaj personaj nomoj havas specialan signifon, tial ili estis esperantigitaj kun rusa finaĵo. La komprenon multe helpas la unikaj, detalaj notoj, kiuj klarigas ne nur la vortojn, en vortaroj netroveblajn, sed ankaŭ la historiajn, ideajn fonojn, kaj tiutempajn aktualaĵojn, sloganojn.

Tamen malgraŭ la notoj, sen la kono de Biblio, de la tiutempa historio, la ĉiutagaj eventoj en Sovetio, la kono de mezepoka mistikismo, ekzemple Faust-legendo, la romano ne estas plene komprenebla. Tial mi ne povis diveni, ĉu la aŭtoro volis metafore priskribi ion, aŭ tutsimple li nur lasis senbride kuri sian riĉan fantazion.

En la antaŭparolo Spomenka Štimec klarigas, ke la romano estas ĉefverko el la rusa literaturo. Mi, kiel simpla, iom klera leganto preferas la realismajn verkojn.

János SÁRKÖZI

Miĥail Bulgakov, *La majstro kaj Margarita*. Eld.: Sezonoj, Sverdlovsk, 1991. 374 p. Prezo ĉe FEL: 750 BEF + afranko, ĉe UEA 36,00 NLG + afranko.

Historio de Internaciaj Lingvoj

Miraklo okazis en Rusio. Meze de profunda ekonomia krizo, la preskaŭ malviva eldonejo Progress sukcesis reaperigi raraĵon de la prilingva Esperanto-literaturo, la klasikan monografion de Ernest Drezen: *Historio de la Mondolingvo*; tri jarcentoj da serĉado.

La aŭtoro kaj lia libro spertis interesan sed samtempe tragikan sorton. Drezen estis pafekzekutita je 45jara aĝo kiel „teroristo, sabotisto, kaj spiono” kaj lian verkon – pinton de lia tuta krea kariero – oni kaŝis dum pli ol duona jarcento en t.n. speĥrano, speciala „malliberejo” por „punitaj” libroj.

En 16 ĉapitroj la verko sisteme priskribas pli ol 460 lingvoprojektojn. Tamen, la nuna eldono ne estas simpla represo de la iama klasika libro. La historion de ĝia apero, evoluo kaj „kristaliĝo” traktas en ampleksa enkonduko ties redaktoro, Sergej Kuznecov. Li science komentas la tekston, korektante, aldonante kaj interpretante ĝin laŭ nuntempaj sciencaj pozicioj. Tiele tiu ĉi jam klasika verko brilas per novaj facetoj kaj iĝas ankoraŭ pli alloga por legado. Aldoniĝas diversaj ĉapitroj el aliaj pli fruaj eldonoj de la libro, kaj aliaj verkoj de la aŭtoro.

Provizita per indekso kaj listo de la verkoj de E. Drezen, la volumo povas servi ne nur kiel studobjekto por seriozaj esploristoj, sed ankaŭ kiel konsult- aŭ man-libro pri la historio de interlingvistiko. Simpla lingvaĵo permesas rekomendi ĝin al la plej vastaj rondoj de legantoj.

Kaj laste, ĝi estas presita sur bona papero, bele bindita kaj kun luksa kromkovrilo.

NikSt

Ernest Drezen: *Historio de la Mondlingvo: tri jarcentoj da serĉado*. Eld. Progress, Moskvo, 1991. 456 p. Prezo ĉe FEL: 870 BEF + afranko, ĉe UEA 48,00 NLG + afranko + imposto.

de Antropoido Ergatis

Sapiensopolis

Kara kamarado Ceresano,

Gravitapetito de la Kosma Nigra Truo kaj ĝia Trojĉevala filio SAO (Sapiensa Aŭtonoma Okrokratio) detruas ĉion kaj ankaŭ la PTT-trafikon en Asteroïda Zono. Kvankam tre malfrue, mi tamen ricevis Vian leteron el kiu mi kun ĝojo legis, ke Via bumerangforma asteroïdo Cereso estas la dua el ses asteroïdoj en Asteroïda Zono sur kiu venkis Antropoidoj. La Nigra Truo furioze anatemas la libereman Sunon, la anatemata Suno protuberance gratulas al Antropoidoj kaj mi nur bedaŭras ke mi ne plu vivas sur mia Cereso! Tre dankinda estas Via memoro kaj intereso pri mi, kvankam ni disiĝis, antaŭ ol ni finis la elementan lernejon. Kaj - post tiomaj jardekoj - ne estas mirinde, ke Vi starigis al mi tiom da demandoj. Al ĉiu Via demando mi respondas detale:

Mi ŝime vegetas en Sapiensopolis - ĉefurbo sur metropola planedo de la ptolemeisma kontraŭsuna planedsistemo, regata per la opinia monopollo de la Sankta Triunuo, konsistanta el la Kosma Nigra Truo, Komputila Partio kaj Flavrobota Sindikato.

Membreco en la Komputila Partio estas io ekskluzive honora. Membreco en la Flavrobota Sindikato estas io nek ekskluziva nek honora, sed nur bonvolige aŭtomata. Pro kio? Mi ne scias... eble nur pro la membrototizo... Tiu Flavrobota Sindikato luktas por intereso de la Sankta Triunuo kiu certigis al si monopolon por ideologie eduki la eksterpartian laboristan kosmopolvon por ke ĝi ne restu en barbareco de sia aŭtenta anarkia utopismo. Tio kongruas kun la Sankta Mesaĝo:

„La sankta historia Misio de Komputila Partio estas: Ĉiun antropoidan laboristan kosmopolveron eduki tiel, ke ĉiu el ili estu programita laŭ gena kodo de SS (sapiensa socialismo). Kaj kiam ili ĉiuj estiĝos la finprogramitaj robotoj, mem per tio ili ĉesos esti robotoj, estiĝinte nur la Homoj Sapiensoj! Realigon de tiu Mesaĝo garantias Gravitdiktaturo de la Nigra Truo...”

Kiam mi aŭdis tiun Mesaĝon, mi ankoraŭ estis bubaĉo. Ĉar en la sapiensa socialismo validas nur ĉi tiu solkonebla Mesaĝo, ĝi estis por mi plej bela

en la konebla Kosmo. Kaj la bubaĉoj kaj antropoidoj estas ja tiaj estaĵoj: Simie scivolemaj pri ĉio solkonebla! Samkiel ĉiu bubaĉo, ankaŭ mi flagre eksopiris kiel eble plej tuje estiĝi Homo Sapienso...

Nu, mi devas al Vi konfidi, ke en tiu Mesaĝo mi tuj vidis la petolŝancon akiri avantaĝon super miaj antropoidaj gepatroj: Estiĝi Homo pli frue ol ili mem! Hura!

Forlasinte la elementan lernejon, mi fuĝis de la gepatroj el la antropoide primitiva Asteroïda Zono, rekte al Sapiensopolis ĉar nur tie - per la Mesaĝo - mi kredis la ŝancon esti homigita. Antaŭkondiĉoj por tio estis maturaj. Jam estis realigita la ĉefa revolucia celo: Ĝis la neatingebla alteco estas elkreskinta la hierarkia piramido de la Nigratra Gravitdiktaturo kaj la sapiensiga arbitreco de ties sapiens-socialisma minorito super la antropoidlaborista majorito. Kaj - bonvolige aŭ far' de la Gravitdiktaturo de la Nigra Truo

- tio por la antropoïda laborista kosmopolvo estis neeviteble klara. Ju pli entuziasme mi deponis mian vivon en la plurajn Kvinjarajn Planojn por la triumfa ekspansio de la Nigra Truo, des pli senpacience mi sopiris akiri rangon de l' Homo...

Ĉar tri jardekoj da laboro por la sapiensa socialismo nur finpaligis la maksimumon „Laboro kreis la Homon”, iompostio me mi perdis la paciencon kaj fidon al mia brila - ĉiam pli postmorgaŭa sapiensa Morgaŭo - mi konkludis, ke la Sankta Triunuo - pro iu nekonata kialo - evitas eduki min sapiense. Finfine, mi akumulis la ŝoke impertinentan aŭdacon por al la Dejor-



anta Komputilpartia Kromcerbo starigi la rektan demandon:

- Nu, kial mi ne estas sapiense edukata?

Ĉu por sian respondon ŝajni die grava, ĉu por konsulti la tutan hierarkion de la Dejorantaj Kromcerboj aŭ pro ambaŭ kialoj, la Kromcerbo diris ke por la respondo mi venu - morgaŭ! Kaj morgaŭan tagon - anstataŭ ricevi lian responon, mi suferis la demandon:

- Pri kio hieraŭ ci estas min demandinta?

- Mi estas demandinta: kial mi ne estas sapiense edukata?

- Ci ne estas sapiense edukata ĉar ci ne estas Partiano!

- Kaj kial mi ne estas Partiano?

- Tial ĉar ci ne estas sapiense edukita!

- Kaj kial mi ne estas sapiense edukita?

- XYZ (-+)&(+-)=(?!)&(?!?)Q& krrraaak

Dum kelkaj minutoj la Kromcerbo knarkrakis kaj restis muta. Subite, el liaj ruĝaj elektronikaj okuloj sekvis tondro, fulmo, flamo, fumo kaj - silento. Mi kolere piedpabis la postajon de la Kromcerbo kaj subite, el lia aŭtoritata postajaperturo - nomata „Rezerva Argumentado” - elsaltis unu Flava Roboto kiu tuj punsalutis min per la lasera vipo, knarkriante:

- La Partia Kromcerbo ne estas programita por liveri la respondojn al Antropoidoj, eĉ malpli por la respondado al ciaj labirintigaj demandoj per kiuj ci vandalisme krevigis kaj bruligis la argumentkapaciton de la Partia Kromcerbo, estu malbenata ci, anarkiisma Antropoido, iru for, iŝ!...

Mi ne estus evitinta la morton, kurfuĝinte elsub la pluvo de laservipoj, sed savis min la subite aperinta Verda Roboto kiu tuj lasere kontraŭvapis la Flavulon kiu knarkriante fuĝis reen - en la postajaperturon de la Partia Kromcerbo. Post la rekonsciiĝo, mi diris al la Verda Savinto:

- Elkoran dankon, mi estas Antropoido Ergatis, Numero Sesmiliono, el la Dektria Fuŝgeneracio!

- Ne dankinde, mi estas Verda Roboto, Herezulo X-Miliono, el Parasero Anarkio!

- Kaj kial Vi atakis Vian kolegon por defendi min?

- Li estas, ne mia kolego, sed mia ekspatro kaj gorĝmalamiko!

- Nu, kial tio... „ekspatro”?

- Tial ĉar li iam estis mia patro. Sed foje iu anarkia komputilviruso kaŭzis en lia cerbo la morde satiran premsonĝon pri la Gravitudiktatura Nigra Truo. En tia stato, li publike direktis sinceran kritikon al la Sankta Triunuo kaj - ĉar la viruso kaŭzis ankaŭ la kolikon -



la Sindikatan Legitimilon li foruzis - tualete!!! Pro tio li estis tuj areste fermita en la Robotikiatrian Klinikon kie la Robota Ekzekuta Fako forviŝis lian memoron. Nun mia patro estas „ekspersono” - plu memoranta nek sian familion, nek sin mem. Kaj poste - per la speciala finstuporiga terapio sur la Nudisma Insulo, li estas reprogramita por la posteno de l' ekzekutisto en la Janiĉara Persekuta Fako. Unu el ciferoj de lia Persona Numero indikas, ke li estis malamiko de la Nigra Truo...

- Kio estas Persona Numero?

- Ve, ĉu Vi ne scias tion? En ĉies legitimilo - krom la Registra Numero - estas ankaŭ la Persona Numero kiu enhavas aŭ ne la Krimuligan Ciferon.

- Por kio servas tiu Krimuliga Cifero?

- Ĝi servas por la anticipa jura kaj ĝeneralsockia diskrimino kiun la Nigra Truo aplikas laŭ la sekreta leĝo, nomata la Diskrecia Povo. Se la Persona Numero ne enhavas ankaŭ la Krimuligan Ciferon, nur tiam Antropoido havas la rajtoŝancon esti la finprogramita Homo Sapienso - la digna civitano de la Nigra Truo, sed en la kontraŭa kazo...

- En tiu „kontraŭa kazo”, mi jam estas antaŭkondamnita por dumvive resti la sapiense needukita Antropoido Ergatis, Numero Sesmiliono, el la Dektria Fuŝgeneracio ... sed ... lasu tion, kial Vie stas Verda Roboto?

- Samtial, kiel ankaŭ Vi: Niaj gepatroj verŝajne devenas el la Blua kaj el la Flava Ringoj de Saturno! Sed nia komuna verdeco estas heredita, ne nur el la gena kolorspektro de niaj gepatroj, sed nepre el la Krimuliga Cifero de la Persona Numero, rezultinta el la komputila analizo pri la gena kolorspektro.

- Ho, nur nun mi komprenas, kial krevis la argumentkapacito de tiu Partia Kromcerbo kaj kial sekvis tiu „Rezerva Argumentado”!

- Jes, ni estas anticipaj traktataj kiel eĉ senkonsciaj malamikoj de la Nigra Truo, kvankam la realo estas inversa ... sed ... ni ĉesu babilperdi la tempon ĉar mi ne estas certa ĉu per laservipo mi sukcesis finkalemburigi la cerbon de mia ekspatro Flavroboto. Li certe antaŭsendis konfliktsignalon al la Janiĉara Persekuta Fako. Tiukaze, ni jam estas re-re-re-registritaj en la Nigran Kodon.

- Kio estas Nigra Kodo?

- Ve, Vi estas terura demandulo, per Viaj labirintigaj demandoj, Vi krevigos ankaŭ mian cerbon! Prefere ni urĝe fuĝu ĉar mia knarcerbo jam registras alarmon de la Janiĉara Persekuta Fako...

Baldaŭ komenciĝis la harhirtiga siren-hurlado, sed tio estis, ne alarmo de la Janiĉara Persekuta Fako, sed alarmego de la tuta Nigra Truo kontraŭ la ĉiam pli timiga invado de l' Kosma Racio. Kun Verda Roboto mi fuĝis en lian provizoran loĝejon. Tio estis ĉambro en la betona kelo de iu fabriko, bankrotigita per embargo de l' Kosma racio kontraŭ la Nigra Truo.

Centralo elŝaltis la elektron, ekregis densa mallumo, sed la Verdulo recertigis al ni la lumon de l' memorata optimisma etoso, kantante la parodion: „Tra ĉambro en kelo, briletas kandelo”. Ĉu pro la ĉambro, ĉu pro la kelo aŭ pro la kandelo, ni kune ekkantis la konatan, eterne verdan kanzonon „La enbotela ŝipo” de Ceresano Arsen De-diĉ:

*En mia ĉambro -
ĉe lum' de l' kandelo -
kantante odon al la liberiĝo,
mi fikse observas - ne sen ekscitiĝo -
iun ŝipeton en vitra botelo
kiu lule krozas tra botel' da maro,
kun la postenanta, vigla maristaro -
et-ajnularo, sen liberprincipo,
en la malgranda, enbotela ŝipo.*

*Subite, mi frapas per la martelo
kaj ŝipo iu - tie en botelo -
lante droniĝas, sekvante fatalon,
tirante kun si en ŝajnan profundon
la vantan revon, blagan idealon...*

Kara amiko Ceresano, la lumdaŭro de ĉi tiu lasta kandelo ne sufiĉos por ke mi skribu al Vi dezirlonge kaj antaŭ la kandelo mi amike salutas Vin kaj tutan Asteroidan Zonon, dezirante al ĉiuj ok asteroidoj la lumon de l' finliberiĝo el la Okrokrata Gravitudiktaturo de la disfalinta Nigra Truo.

Via kamarado
Antropoido Ergatis,
En Sapiensopolis,
la 25an de Tito, 174an jaron post Karlo.

de Julian Modest

La teatro – eterna kaj bezonata

La teatro estas unu el la plej sintezaj artoj. Ĝi inkluzivas la literaturon, la muzikon, la dancon, la pentroarton. Ĝi bezonas dramverkistojn, geaktorajn, reĝisorojn, komponistojn kaj kompreneble spektantojn. La teatro ne povas ekzisti sen geaktoraj aŭ sen spektantoj. Ĝi estas socia fenomeno, kiu signas la evoluon de la civilizo.

Io magia estas en la mondo, kiun oni kreas sur la scenejo, inter la dekoraj kaj sub la diversaj kolorlumoj. La teatra salono dronas en profunda silento kaj mallumo, kaj antaŭ la publiko, sur la scenejo, okazas homaj dramoj. Tie oni agas, amas kaj malamas, kredas kaj perfidas. Sur la malgranda sceneja spaco vibras la tuta vivo kaj ni ne nur spektas, sed partoprenas en ĝi, travivas ĝin, simpatias aŭ malsimpatias kun tiu aŭ alia persono. Nin sorĉas tiu ĉi granda ludo kaj dum du horoj ni forgesas, ke la tuta vivo estas simila nekomprenbla ludo, ke ĉiutage la vivo tiras nin en similajn tragikajn aŭ komikajn situaciojn, kaj kiel la geaktoraj sur la scenejo, ni same agas ĉu prudente aŭ malprudente, ni amas kaj malamas, estas fidelaj aŭ kontraŭvole perfidas iun. Jen, ankaŭ la vivo estas teatro, tamen ne ĉiam ni deziras vidi aŭ kompreni tion.

En la vivo ni estas seriozaj, eble pli seriozaj ol kiom necesas, sed en la teatro ni amuziĝas, sentas plezuron, ĉagreniĝas aŭ ridas, tamen ni subkonscias, ke tio estas ludo – amuza kaj agraba. La teatro interpretas la vivon, sed ĝi mem ne estas la reala vivo. La teatro ne nur amuzas, sed influas nin kaj tio estas ĝia plej fundamenta signifo.

Fundamenta signifo

Ĉiam, dum la evoluo de la civilizo, ege gravaj estis la rimedoj per kiuj eblas influi homojn. La homaro senlace serĉis kaj aplikis diversajn influ rimedojn, inkluzive de la religio, kaj la oratora arto, sed evidentiĝis, ke unu el la plej fortaj estas la teatro.

De la scenejo senpere kaj rekte eblas penetri en la plej profundajn tavolojn de la homa memo kaj signife influi la pensojn kaj sentojn.

De la stato de la homa mondpercepto dependas la homa ekvilibro en la socio kaj la normala adaptiĝo al la cirkonstancoj. Ĝuste pro tio la rolo de la teatro ege gravas, ĉar ĝi rekte influas la homan mondpercepton. La homo, la spektanto travivas la teatran verkon kaj se pli forte li travivas ĝin, la teatra verko pli profunde tiras la spektanton

al personaj rememoroj, imagoj, intimaj travivaĵoj, surbaze de kiuj la spektanto trapasas kaj pritaksas la teatran verkon.

La spektanto tamen ne ĉiam sentas tiun ĉi influon, ĉar danke al la teatraj specifikaj influoj estas diskreta kaj subtila. De la scenejo oni ne aŭdas didaktajn formulojn, konatajn pensojn, kliŝojn, pretajn konkludojn, sed delikate oni instigas al pensado, medito kaj la spektantoj mem faras la konkludojn. Tio ĉi estas la plej signifa trajto de la teatro. Ĝi ne prezentas sentojn, ĝi provokas sentojn, igas la spektantojn reagi, kaj surbaze de tiu ĉi reago la teatro influas.

Unu el la plej gravaj roloj en la teatro estas la rolo de la dramverkisto. En la teatra verko, ĉu tragedio, dramo aŭ komedio, la plej signifa estas la subteksto. La verkisto ne diras ĉion, li nur aludas. Per la magio de la vortoj li direktas la atenton de la spektantoj, kiuj mem faras la konkludojn kaj atingas ĝis la ideo, ĝis la kerno de la problemoj.

Plej aktivas la spektantoj

La spektanto estas ne nur atestanto de la intrigo, kiu okazas sur la scenejo, sed li aktive partoprenas en ĝi. Dum la spektaklo li pensas, travivas, reagas, li provas antaŭvidi la reagojn de la rolantoj kaj decidi kiamaniere li reagas, se li mem troviĝus en simila situacio. Ne hazarde en la teatra arto la plej aktivaj partoprenantoj estas ne la reĝisoro, ne la geaktoraj, sed la spektantoj.

La plej granda avantaĝo de la teatra spektaklo estas, ke ĝi okazas nun, sur tiu ĉi loko kaj en tiu ĉi momento. La poezio revenigas nin en niajn rememorojn, vekas pasintajn emociojn kaj travivaĵojn. La prozo sekvas la naturan vojon de la okazintaĵoj, klarigas ilin, montras la kialojn, kiuj provokis ilin, ligas ilin al la estintaj okazintaĵoj, priskribas la homojn, kiuj partoprenas en ili, prezentas iliajn karakterojn, kaj montras iliajn psikologiajn reagojn. En la teatro, tamen, ĉio okazas nun, antaŭ niaj okuloj. Estiĝas situacioj, en kiuj la partoprenantoj, la rolantoj devas tuj re-

agi kaj dum la reagoj riveleĝas karakteroj kaj mondperceptoj.

La spektantoj nesentebles estas kaptitaj en tiu ĉi ludo, kiun oni nomas teatro.

Lingvo vivas

Zamenhof havis la genian ideon ne nur iniciati la Lingvon Internacian, sed ankaŭ krei la unuajn literaturajn verkojn en ĝi. Jam en la aŭroro de Esperanto, Zamenhof konsciis la gravan rolon de la teatro. Li bone komprenis, ke la lingvo vivas kaj pulsas ne nur en la homaj rilatoj, sed same de la scenejo, de kie oni povas aŭdi kaj percepti modelan vervan lingvon.

Ĝis nun, kiam mi devis plurfoje prelegi pri la originala Esperanto-literaturo, mi emfazis, ke Zamenhof tradukis en Esperanton dramajn verkojn por doni ekzemplojn pri la parola lingvo, tamen nun mi komencas pensi, ke Zamenhof ne nur tial tradukis dramverkojn de la plej elstaraj mondaj dramverkistoj, sed pro la fakto ke li bone komprenis la rolon de la teatro kaj sciis, ke rekte de la scenejo la vojo de la lingvo estas pli mallonga kaj multe pli efika.

Vere genia estis tiu ĉi bjalistoka junulo, kiu ege frue komprenis la leĝojn de la socio kaj senerare konkludis, ke nur pere de la lingvo oni plej efike povas influi la homan mondpercepton, kaj verŝajne intuicie li komprenis, ke unu el la plej grandaj rimedoj por tiu ĉi influo estas la teatro.


Unue la liriko

Zamenhof strebis instigi la unuajn Esperanto-verkistojn al dramverkado. Ne hazarde li tradukis en Esperanton la plej grandajn dramverkojn de la monda literaturo kiel „Hamleto” de Ŝekspiro, „La Revizoro” de Gogolo, „La Rabistoj” de Ŝilero, ktp.

Tamen la originala Esperanto-literaturo sekvis la naturan vojon de la evoluo de ĉiuj naciaj literaturoj. Unue aperis kaj evoluis la liriko, poste la prozo kaj laste la dramo. Ne hazarde ankorau nun, post pli ol unujarcenta ekzisto de la Lingvo Internacia, la Esperanto-dramo postsekvas la evoluon de la Esperantaj liriko kaj prozo.

Provoj en la esperanta dramo ne mankas, eĉ elstaraj Esperanto-verkistoj kiel Edmond Privat, Julio Baghy, Marjorie Boulton, kontribuis al la originala Esperanto-dramo, tamen ni ankoraŭ ne povas paroli pri signifaj dramverkoj en Esperanto.

La kialoj pri la malrapida evoluo de la Esperanto-dramo estas pluraj kaj unu el ili laŭ mi estas la manko de Esper-



antaj teatroj, pro kio la dramverkistoj ne havas stimulon verki.

Vere, ke dum la jarcenta historio de nia movado aperis kelkaj Esperantaj teatraj trupoj, kiuj lasis spurojn en la historio de nia originala kaj unika kulturo, sed ili preskaŭ ne stimulis la originalan draman verkadon.

Tiuj ĉi teatroj preferis prezenti en Esperanto konatajn dramverkojn el la monda literaturo kaj tiel neglektis unu el la plej gravaj roloj de la teatro. Iliaj reĝisoroj forgesis aŭ tute ne interesiĝis pri la fakto, ke kiam en Eŭropo formiĝis la nacioj, la plej gravan rolon ludis la teatroj, kaj la dramoj, kiujn ili prezentis, kvankam neperfektaj, eĉ naivaj, senerare respondis al la postuloj de la epoko kaj spegulis la plej gravajn, la plej aktualajn problemojn.

Miskomprenita celo

Ĝuste tion ne komprenis la Esperanto-teatroj. Preskaŭ ĉiuj el ili aŭ deziris popularigi naciajn dramverkojn pere de Esperanto kiel dum longaj jaroj faris la Esperanto-teatroj el Bulgario, Pollando, Hungario kaj Francio, aŭ ili celis rapidan popularecon per naivaj, sed konataj komedioj de la monda literaturo.

Ne hazarde, kiam Giorgio Silfer, recenzante la teatron prezenton de Bulgara Esperanto-Teatro „La Gastejestrino” de Carlo Goldoni, en *Literatura Foiro* 1992/133, emfazas ke „La torina enscenigo, kun ĉiuj siaj meritoj, flosas svelte kiel veltabulo sur la Nigra Maro, plenumas la miraklon de amuzo tra kompreneblo, sed kondukas nenien; bela drivo, punkto.”

Kaj tie aperas la dua ĝenerala demando: kial difinita aŭtoro, certa dramo en Esperanto? Kial Goldoni en verda li-

vreo? Kial Sofoklo en verda ĥitono? Kial Goethe en verda mantelo? Antaŭ la enscenigo de tradukita teatraĵo, necesus difini kion tiu dramo povas signifi por transnacia publiko, kiaj estas la transnaciaj valoroj emfazablaj en ĝi, ekzemple. Ĉu ekzistas verda binoklo por spekti „La Gastejestrino”?

Por plenumi sian avangardan rolon en la esperanta kulturo, Esperanto-teatro devas respondi al la bezonoj de la esperanta socio. La instruado de la lingvo estas multe pli alloga kaj multe pli facila, kiam en la instruproceso estas uzataj etaj dramverkoj, skeĉoj, komedioj. Tiamaniere nesenteblo, ludante, oni alproprigas ne nur la modelan precizan lingvon, sed same la vivan parolan lingvon, esprimitan en vigla dialoga formo.

Esperanto-socio ankoraŭ estas malgranda, limigita kaj bedaŭrinde fermita. Malgraŭ tio ke Esperanto estas parolata en multaj landoj, sur preskaŭ ĉiuj kontinentoj, la esperantistoj plej ofte renkontiĝas, kolektiĝas en etaj grupoj. La homoj, kiuj apartenas al tiuj ĉi grupoj kaj societoj estas ligitaj de komuna celo - la Lingvo Internacia. Tiuj ĉi homoj ofte sentas bezonon kune pasigi kelkajn agrablajn horojn kaj unu el la plej malnovaj amuzoj estas la teatro.

La teatra apliko de Esperanto ŝajnas esti la plej natura, la plej taŭga ekzisto de la lingvo. La teatra arto estas fermita pro la lingvaj baroj kaj nur danke al internacia lingvo kiel Esperanto ĝi povas venki tiujn ĉi barojn kaj fariĝi vere internacia.

Malgrandaj trupoj

Esperanto bezonas ne grandajn tea-

trajn trupojn, kiuj prezentas imponajn spektaklojn, sed malgrandajn trupojn el du, tri aŭ maksimume kvar geaktoroj, kiuj prezentu originalajn unuaktajn aŭ duaktajn komediojn, dramojn, skeĉojn.

La ekzisto de tiuj ĉi teatraj trupoj, kiuj devas esti pli multaj kaj en diversaj landoj kaj urboj, stimulos la Esperanto-verkistojn krei originalajn dramverkojn. Iom post iom aperos verkoj, kiuj enhave estos ligitaj al la problemoj de la Esperanto-socio. Iliaj temoj estos el la historio de la Esperanto-movado, en kiu tute ne mankas dramaj konfliktaĵoj momentoj. La Esperanto-dramverkistoj pritraktos problemojn el la nuntempa Esperanto-socio kaj tiel nature estos kreita la Esperanto-teatro, kiu enhave kaj esence estos vere esperanta kaj ne nur esperantlingva aŭ, kiel diris Silfer, teatro en verda livreo, en verda ĥitono aŭ en verda mantelo.

Kompreneble tiu ĉi procezo estos malrapida kaj longdaŭra. La naskiĝo de similaj etaj teatraj trupoj ne estas facila, tamen provoj ne mankas. Antaŭ du jaroj en Sofio aperis teatra trupo „Fokuso”, konsistanta el tri geaktoroj, kiuj dum du jaroj surscenigis tri dramverkojn kaj faris plurajn prezentojn en diversaj bulgaraj urboj. La agado de Fokuso estis eksperimenta, sed ĝi montris, ke tie estas la natura vojo de la vera Esperanto-teatro.

La nuna Esperanto-socio bezonas la teatron kaj mi opinias, ke estonte la esperanta teatro ludos pli gravan kaj pli signifan rolon. Estas malfacile antaŭvidi la vojon de ĝia evoluo, sed certe ĉiam estos aŭtoroj, kiuj verkos dramverkojn en Esperanto, geaktoroj, kiuj emos ludi ilin kaj publiko, kiu deziros spekti ilin.

Pajlaj pupoj



Stranga popularto ekzistas en Britio de antaŭ multaj jaroj, kiu dum la pasintaj jardekoj kreskis ĝis profesio en kelkaj lokoj. Tiu popularto estas la kreado de figuroj, formoj, objektoj, el la tigoj de la matura tritiko kaj hordeo. Foje tiuj kreaĵoj atingas ege kompleksajn formojn, en la manoj de spertulo tre belajn.

Per diversaj tordoj kaj plektoj kun celo kunfiksi kaj fortigi la materialon, preskaŭ ĝis solideco, eĉ delikate kirli la ekstremaĵojn, en lertaj manoj la flava tigaro prezentas sin ne simple kiel longan mallarĝan strion el la farmbieno, sed kiel misteran aŭ simbolan, kiel ornamon beston, krucon aŭ birdon, eĉ feece delikataj. Apenaŭ estas limoj al la produktaĵoj. Eĉ plurajn metrojn altaj, faritaj el milmiloj da strioj. En iuj lernejoj, kie troviĝas kapabla instruisto, infanoj lernas la arton egale kiel oni lernas ankaŭ aliajn artojn.


Necesas rikolti la tigojn en la ĝusta aĝo kiel eble plej longajn, falĉinte la kreskantan planton zorge por konservi la rektecon kaj forton de la tigo. La kapon, la grajnon de la planto, oni povas uzi foje kiel ornamaĵon, sed la fortika tigo estas la ĉefa materialo. Kaj, ĉar ĝi devas konformi al definitivaj kriterioj, specialistoj kreskigas



La tradicia arto ankoraŭ havas estontecon. Kie troviĝas instruisto, infanoj lernas plekti figurojn el la tigoj de tritiko kaj hordeo.



La rezultoj estas plej surprizaj. Ili povas esti ĉiutagaj uzobjektoj aŭ religiaj objektoj. En lertaj manoj la flava tigo eĉ prezentas sin kiel misteran aŭ simbolan beston.



sian propran tritikon en apartaj kampoj kaj protektataj ĝardenoj. La vento ne tro flirtigu kaj fleksigu por vundi la tigojn. La bestoj travagante ne rompu la longajn striojn. La plantmalsanoj ne ataku, la malpuro ne difektu. Ĉio por la profesiulo devas esti perfekta.

Normale kreskanta tritiko ne taŭgas, kaj ne ĉiu specio de tritiko estas bona. Foje aliaj cerealoj provizas bonan materialon; la profesiulo faru decidon pri tio laŭ la intencoj de la finita modelo.

Pro ĉio ĉi la kosto de unu peco en la butikoj povas sumiĝi al, ekzemple, dudeko, kvindeko, eĉ al centoj, da ekuoj. La aĉetanto devas zorge porti hejmen kaj montri sur siaj muroj aŭ en vitrino. Tamen vi neniam insultu la artiston farbante aŭ alimaniere donante koloron al la finita verko. Ĝi devas resti ĉiam same flava kiel en la tago kiam ĝi estis kreata. Ĝi estas farita el natura materialo, kaj restu ĝi naturaspekta.

Will GREEN

Al pli bona interkompreniĝo

Unu nederlandano el dudek estas islamano. Por okcident-eŭropa lando tio estas relative alta procentaĵo. Pastoro Jan Slomp havas kiel taskon plibonigi la rilatojn inter islamanoj kaj kristanoj. MONATO intervjuis lin.

MONATO: Kio estas via oficiala funkcio, sinjoro Slomp? Kiel longe tion vi jam faras?

SLOMP: Mi estas „pastoro en ĝenerala servo por informado pri la renkontiĝo kun islamanoj en la socio”. Do ne estas mia tasko organizi evangelizo-kampanjojn, k.s., sed kristanojn mi devas kontaktigi kun islamanoj. En 1977 mi komencis; jam sammonate ĉe konferenco en Svedio mi devis prelegi pri Islamo. La internacia dimensio do de la komenco estas esenca. En 1978 mi estis petita kiel sekretario de la nove fondita komisiono „Islam0” de la Konferenco de Eŭropaj Eklezioj (KEK). La Nederlanda Konsilio de Eklezioj starigis sekcion pri mondreligioj en kiŭ kunlaboras pli malpli ĉiuj eklezioj de Nederlando. Ankaŭ mi laboras en ĝi. Ĉirkaŭ 60 % de mia labortempo estas uzata en la kadro de (mia) reformita eklezio, 20 % por la Nederlanda Konsilio de Eklezioj kaj 20 % por KEK. En Nederlando entute estas en 130 urboj kaj vilaĝoj moskeoj, entute pli ol 300 por ĉirkaŭ 450 000 islamanoj. En tuta Eŭropo nombriĝas 27 milionoj da islamanoj el kiuj en okcidenta Eŭropo 7 milionoj.

MONATO: Kiel vi kunlaboras kun viaj eksterlandaj kolegoj?


SLOMP: En okcidenta Eŭropo ni havas interkonsiliĝajn organojn, i.a. studokomisionon kaj depost 1980 la t.n. Tagojn de Arras [Ará]: kunvenas 20 ĝis 30 okcident-eŭropaj kolegoj por preparoli problemojn, eldonaĵojn kaj aliajn.

MONATO: Ĉu en Nederlando vi havas rektajn kolegojn?

SLOMP: Jes, pastorino Gé [Ĥe] Speelman (nederland-reformacia) kaj L. van Oers [Urs] (rom-katolika).

MONATO: Kial ĝuste vin oni prenis por tiu laboro?

SLOMP: Mi laboris kiel misiisto 4 jarojn en Pakistano, precipe ĉe edukaj projektoj, poste 9 jarojn ĉe kristana studocentro tiea, kun la tasko pristudi Islamon, subteni dialogon. Estis tre ekumena tasko: protestanta iniciato kun rom-katolika kunlaboranto.



MONATO: Kiun konkrete, vi renkontas en via laboro?

SLOMP: Temas ĉefe pri edukado kaj informado al lokaj grupoj kiuj okupiĝas pri renkontiĝoj kun islamanoj. Krome mi stimulas lokajn ekleziajn komunumojn ke pri tio ili ek-okupiĝu. Minime kie troviĝas moskeoj, mi prizorgas prelegojn, kursojn, publikaĵojn en gazetoj kaj revuoj, en radio kaj televido. Kelkfoje temas pri tre specifa pastora laboro: ĉe miksitaj geedziĝoj aŭ mallibereja pastoreco. Ankaŭ kun pastoroj en malsanulejoj mi ofte laboras. Foje lokaj lingvo-instruistoj bezonas informadon pri Islamo, se en konkretaj situacioj ili renkontas problemojn. Plej laborpostulaj estas la miksitaj geedziĝoj, kio ankaŭ estas ripetiganta temo en la Tagoj de Arras.

MONATO: Kiun lingvon tie oni uzas?

SLOMP: La tagoj komenciĝis en Arras en Francio. Nun ili ofte okazas ankaŭ en aliaj urboj. Ni havas du oficialajn diskutlingvojn: la anglan kaj la francan.

MONATO: Ĉu vi havas ian imagon pri la efiko de via laboro?

SLOMP: Devas esti efiko; almenaŭ eblas konstati, ke ekzistas granda interesiĝo. Kelkfoje mi ricevas pli ol 200 invitojn por prelegi en jaro. Por la baldaŭ okazonta eklezio-tago en Amersfoort sin anoncis jam pli ol 900 homoj por mia ero, kvankam estas loko por maksimume 300.

MONATO: Kiel vi taksas religiajn kaj sociajn antaŭjuĝojn en Nederlando?

SLOMP: Estas sufiĉe da indikoj por la tezo, ke kie eklezioj sin opinias kun-respondecaj pri islamanoj surlokaj, ke tie malpli grandaj estas la ŝancoj je rasismaj devioj. Kie eklezioj faras nenion, islamanoj sin ofte sentas ne sendanĝeraj kaj tie oni konas ekscesojn. Laŭ mi la ĉeesto de islamanoj estas socia defio kun religia dimensio. La eklezio ne tro atentu la religiajn diferencojn sole. Oni eble atendus, ke pli ortodoksaj eklezioj pli bone povus kompreni Islamon. Sed en la praktiko precipe la liberalaj kristanoj (ekzemple la remonstrantoj kun sia humanisma eco) montris de la komenco pli da kom-

preno. La ortodoksaj eklezioj estas tre bremsataj, se temas pri vera renkontiĝo; ili prefere provas konverti la aliajn. Ili ankaŭ finance subtenas misiadajn movadojn en islamaj landoj.

Sed ree al la demando: en Nederlando mi ne opinias la situacion malfavora. Tiuj egaj tumultoj antaŭnelonge en Germanio ne transiris al nia lando. Mi ĵus estis en Britio: en Birmingham la situacio grade pliboniĝis ankaŭ danke la klopodojn de eklezioj. Mi parolis kun imamo. Nun tie estas komuna kvartala konsilio de judoj, islamanoj kaj kristanoj kune. Kune ili havas atenton pri la problemoj de senlaboraj junuloj. Oni ja diras ke „la eklezio ne plu havas influon”, sed tio ne estas vera! Ne estos monda paco sed religia paco. Estas esence ke, kie estas moskeoj, tie eklezioj sin sentas kun-respondecaj. En Germanio, en Rejnlando-Vestfaliao, en ĉiu eklezia regiono estas unu pastoro kies specifa tasko estas la kontaktoj kun islamanoj. Ne kiel plentaga okupo, sed kiel unu elinter la taskoj. En Kolonjo estas plentempa pastoro por tio. Granda problemo estas la senlaboreco de marokaj junuloj: kaj krome granda procentaĵo da senlaboruloj inter la molukaj junuloj. Pri tio nepre estas io farenda! Se iun vesperon mi prelegas kaj iu starigis dogman demandon, kutime temas pri iu kiu neniam renkontis islamanon. La ĉefa problemo ne estas dogmoj sed socia akceptado.

MONATO: *Ĉu vi konstatas ŝanĝiĝojn dum tiuj 15 jaroj, en kiuj vi faris tiun ĉi laboron?*

SLOMP: Jes, ŝanĝiĝo de ĉefe parola al pli surpapera informado i.a. pro tio ke la geografia disdividiteco de islamanoj en Nederlando ege kreskis. Restas la koncentriĝoj en la grandaj urboj, sed la plinombriĝo

„La moskeo ne plu estos fermita, se kristanoj montras interesiĝon.”

okazis pli en la provincoj. Ankaŭ la variado inter la islamanoj mem kreskis. Grupoj kiuj komence estis unuecaj, disfalis. Kaŭzo estis ekzemple, ke inter la azilpetantoj kaj rifuĝintoj troviĝas islamanoj el aliaj regionoj ol tiuj, kiuj origine venis ĉi tien kiel „gastlaboristoj”. Ekzemple egiptanoj, kiuj per miksitaj geedziĝoj volas legalizi sian restadon ĉe ni.

Alia, sendube grava ŝanĝiĝo estas, ke antaŭ 15 jaroj ĉiuj islamanoj ĉi tie

havis laboron; nun ne plu. Ilia pozicio sur la labormerkato ne estas forta, i.a. pro malalta edukiĝo. Aliflanke tre kreskis la grado en kiu ili sin organizas: ĉefe turkoj, iom malpli surinamanoj, malpleje marokanoj. Se okazas novkonstruo de moskeo, preskaŭ senescepte ĝi estas turka. Ili ne plu petas helpon de eklezioj por konstrui moskeon. Tio ne plu necesas.

Krom tio ambaŭflanke tre klare mal-kreskis la reciproka malfido. Estas nun pli facile starigi kontakton kun moskeo ol antaŭe. Kreskis certa konateco. La Nederlanda Konsilio de Eklezioj ekzemple sendas ĉiujare salutomesaĝon al la moskeoj okaze de l' fino de la ramadano en araba, nederlanda kaj turka lingvoj. Siaflanke la eklezioj ne plu estas rigardataj kun timo. Antaŭe superregis la imago kvazaŭ ni dezirus „rabi” ilian kredon. En turka televido mi klarigis, ke la provoj „konverti” ilin nepre ne estas la ĉefa linio de la eklezioj. Ankaŭ mi mem sentas min pli rekonata. Foje mi volis viziti la novan moskeon ĉe Waalwijk [Valvejk]. Tie ĉeestis kelkaj islamanoj. Mi petis ĉu vizito eblas. Unu diris ke ne sed alia reagis: „Jes, pastoro Slomp, por vi ĝi estos malferma.” La moskeo ne plu estas fermita, se kristanoj montras interesiĝon.

MONATO: *Ĉu por via persona fido, Islamo fariĝis grava? Ĉu ĝi venis pli apuden?*

SLOMP: Kompreneble ekzistas influo. La islaman dimension oni aŭtomate kunplektas ĉe tio, kion oni travivas ene de kristanismo. Morgaŭ mi devos prediki en diservo. Temos pri la t.n. „feliĉo-diroj” el Mateo. Tuj prezentiĝas al mi la rilato: jen, tion mi same konas el la korano. Aliflanke tiu ĉi okupo pri Islamo montris al mi des pli bone, kial mi estas kristano: por multaj la doktrino pri la Triunuo fariĝas io konfuza; por mi male ĝi fariĝas ĉiam pli esenca. La demando pri la fidindeco de la biblio fariĝis por mi ege grava, ankaŭ pro tio, kion tiurilate diras islamanoj: kristanoj falsis la skribojn. Kaj ĉar Islamo estas tre politika religio mi ekhavis pli da intereso por la religiaj aferoj en politika kunteksto.

MONATO: *Unu el la temoj kiujn oni traktos dum la eklezio-tago estas „religio kaj naciismo”. Ĉu pri tio vi povas ion rakonti?*

SLOMP: La ĵus aperinta libreto de l' intereklezia packonsiliĝo havas la titolon „Por Dio kaj patrio”; ĝi traktas tiun temon. En ĝi oni vidas ke Islamo fakte ĉiam estis kontraŭ-naciisma. Nur depost la jun-turka movado oni fariĝis naciisma. La turka-otomana regno ampleksis multajn

naciecojn. En sia florado Islamo ĉiam sukcesis leviĝi super naciismo.

MONATO: *Ĉu ankaŭ je islama flanko oni faras ion por pli bonaj rilatoj?*

SLOMP: Turkaj imamoj ricevas ĉe sia edukiĝo lecionojn pri kristanismo, pli ol antaŭe; en tio kunlaboras ankaŭ kristanaj profesoroj, i.a. iu de la papa universitato gregoria el Romo. Ekzistas krom tio Instituto pri Islamaj Minoritataj Aferoj kun oficejoj en Londono kaj en Saudi-Arabio. Ĝi forte stimulas la dialogon pri islam-minoritatoj en kristanaj regionoj kaj inverse.

MONATO: *Ĉu iam dum viaj multaj internaciaj kontaktoj vi spertis lingvajn problemojn?*

SLOMP: La unua kunveno de l' komisiono „Islam” de KEK ne havis komunan lingvon. La britoj ne scipovis la francan; la francoj ne la anglan. Estis tie ankaŭ danoj, svedoj. Fine montriĝis, ke la lingvo kiun scipovis la plimulto, estis... la araba! Nia hispana membro neniam aperis, verŝajne ĉar li parolas nur hispane.

Gerrit BERVELING

Katedro pri Islamo

Ekde aprilo 1993 en Amsterdamo funkcias la unua universitata katedro pri Islamo de okcidenta Eŭropo. Mohammed Arkoun [Arkún], devena el Alĝerio, fariĝis la profesoro. Antaŭe li jam instruis pri islamaj historio kaj filozofio ĉe la mondfama sorbona universitato en Parizo, kaj antaŭ nelonge li ekinstruis parttempe ankaŭ en Princeton (Usono). Kontraŭ lia kandidatigo en Amsterdam estis iom da protestoj flanke de kelkaj malgrandaj islamaj organizaĵoj en Nederlando, ĉar oni konsideras lin tro liberala, sed montriĝis ke la granda plimulto de la islamaj organizaĵoj sendetene lin subtenas en tiu posteno. Li ja estas scienculo, instruis universitatnivele – ne estas lia intenco fariĝi „la” spirita gvidanto de Islamo en Nederlando. Tiel li mem klare substrekis.

Por la „rivala” nederlanda universitato de Leiden, kompreneble, estas iom bedaŭrinde ke ĝuste en Amsterdamo funkcias tiu ĉi unika katedro. Leiden, kies universitato fondiĝis en 1576, jam depost 1586 ja posedas tre fortan kaj science alte aprezatan katedron pri la arabaj lingvo kaj kulturo, kaj la tiea eldonejo Brill estas mondfama pro siaj eldonaĵoj tiufakaj.

Ĝis nun oni instruis pri Islamo en Eŭropo nur kadre de aliaj, pli malpli parencaj katedroj, ekz. historio, teologio aŭ filozofio.

Gerrit BERVELING

Ĉu havi bestojn hejme?

Fojfoje kortuŝe, fojfoje estetike, fojfoje danĝere aŭ bizare: kolekte prizorgi bestojn kiel hobia

La sinteno de homoj el diversaj rasoj kontraŭ bestoj diversspeciaj estas tiel malsamaj, kiel la homaj rasoj mem. En iuj landoj oni konsideras bestojn malpli valoraj ol homoj en tia grado, ke oni mortpafas ilin pro nura kaprico. En aliaj landoj oni plenkore dorlotas bestojn kaj provas konservi ilin en ties propra medio; eĉ iuj kunvivas kun tiuj bestoj, dividante la propran hejmon kun ili. Eĉ la litojn! En antikva Egipto oni adoris la katojn; en Hindio oni laŭdire adoras bovinojn; en iuj arabaj landoj oni manĝas bovojn kaj similajn bestojn, sed konsideras porkojn malpuraĉaj. En plej multaj landoj la ĝenerala publiko amas birdojn, sed inter tiu publiko ekzistas homoj, kiuj mortpafas birdojn pro simpla sportĝuo. En Britio iam ekzistis modo surmeti plumojn de strutoj kaj aliaj grandaj birdoj, kio necesigis mortigi multajn. Kaj la portado de feltaj peltoj, kiel ornama jako aŭ kolvarmigilo, estis signo de prestiĝo... tamen ne plu! Vegetaranoj rifuzas manĝi bestodevenan nutraĵon; aliaj homoj kredas ke: ju pli da viando, des pli da sano! Sed mi opinias, ke en ĉiu lando ekzistas personoj, kiuj ŝatas iujn bestspeciojn, almenaŭ unuopajn bestojn. Plej ofte en la okcidentaj landoj tiu ŝatata besto estas kato aŭ hundo, sed ankaŭ povas esti ĉevalo aŭ azeno. Evidente, tiuj bestaj amikoj reciprokas la ŝaton kaj pruvas tion per sinofera servado al sia „mastro”. Foje, tiel profunda estas ilia amsentto, ke kiam forestas la koncerna homo, la besto ĝemsopiras. Ĉe la morto de unu el la amika paro homo-besto, la alia foje ekmalsanas, kaj eĉ baldaŭ poste mortas. Tamen, ĉu tio povas klarigi la elekton de besto, al kiu amikiĝi? Ĉu la elekto de besto-amiko spegulas la internan homnaturon? La kaŝitan personecon? Ofte ni vidas superfortikan viron, kiu posedas ege dikan kaj grandan hundon; aliflanke oni vidas gracian junulineton, kiu rajdas tro potencon muskolecan ĉevalon. Kion vi opinius pri mi, se vi sciis, ke dum periodo de 12-14 jaroj mi po-



Foto 1



Foto 2



Foto 3

sedis pli ol 250 katojn? Nuntempe mi malhavas ilin, ĉar irana amikino, kiu loĝas en la sama domo, timas bestojn kaj malamas precipe hundojn kaj katojn!

Amiko mia havis serpenton ege longan kaj pezan (vidu foton). Li foje portis ĝin ĉirkaŭ la kolo kaj mi mem ofte tuŝis ĝin. Alia viro en mia rondo posedis aligatoron (aŭ eble krokodilon, ĉar mi ne scias la diferencon).

La belulino de foto 2 bredis ne nur papiliojn, sed ankaŭ lepidopterojn el diversaj specioj. Mi mem bredis foje dekojn da papilioj, kiuj flugadis libere en mia oficejo, kio tre plaĉis al miaj katoj.

La virino de foto 3 konservis leonidon en sia hejmo, dum pluraj monatoj, kompreneble en kaĝo. Mi karesis foje unu ĝian piedon kaj tio kaŭzis al mi tute molan senton. La leonido ĉe tio ronronis kiel katido!

La bildo de la tininkolo kaj de la erinaco, sur foto 4, montras parteton de la bestokolekto de juna viro. Li bredas kaj vendas diversajn speciojn. En lia hejmo mi iam sidis apud pantero aŭ linko (mi forgesis kiun precize) kaj ĝi simple promenis apud mi tute pace.

En mia propra hejmo, mi havis dum

pluraj monatoj grandan kuniklon blankan, kiu ludis kun miaj katidoj, sed estris la hejmon super la katoj! Ĝi kutimis vagi tra la domo, kaj estis ege pura kaj agraba. Ofte ĝi sidis sur la ŝtuparo kaj malpermesis, ke iu kato preterpasu.

La foto de la granda „fruktovesperto“ (n-ro 5), memorigas min pri interesa okazaĵo. En loka filmteatro oni volis reklami filmon kun titolo „La vespertoj“, kaj prunteprenis ĉi tiun vesper-




Foto 5



Foto 4

la vestiblo de la teatro por allogi vizitantojn. La stabanoj komencis nutri la besteton per „sango“ (kiu envere estis nur fruktosuko) por inciti la klientojn. Post unu-du semajnoj, ili tiel ekŝatis sian flegaton, ke ili plutenis ĝin post fino de la spektakla periodo. Finfine, je ĉies surprizo, ĝi subite naskis idon! Tuj la vera posedanto repostulis ĝin. Eble ĝi estis la unua – eble eĉ nura – vespertido naskita en kaĝo en Britio.

Will GREEN



Kriptogramo

Horizontale

1. Detala stato, en kiu estas sinseksve enskribitaj ĉiuj eltrovoj apartenantaj al iu persono? – Tunik', kiu iras al sud-amerika ĉefurbo? 2. Imitakaton – Ĝi povas esti difinita ornamo, sed ja estas organo 3. Hispana urb', kiu estas astro de stepo – Tiu kastrit' montras pasion de insekto 4. Ŝakpecet' – Indigoplant' – Gustigaĵ' 5. Reĝ', de kiu devenas komplekso – Unu' de termezurado – Parto de plugilo, kiu ŝajnas eksceso de korpa parto 6. Krajoni sur io – Sendube 7. Antaŭ Kristo – Ŝi estis transformita en bovinon – Aĵo – Onomatopea nedifinebla princip'? 8. Artefarita silk', por vesti fiŝon? – Obtuzaj senmoviĝ' simila al disrompo – Filo de 9. Participa sufikso – Adverba monunu'? – Herbo, kvazaŭ frakcio ĉe fermilo 10. Verba finaĵo –

Sidrimed' – Laŭ la maniero teksireton 11. Estanta – Juvelŝton' 12. Onomatopee eleganta? – Kuirusovon 13. Adstringe gustas – Fari ke iu deziru ies havaĵon, aŭ fari ion ajn al iu? 14. Inversa konstelaci' – Kolora likvaĵ' – Bird' kun numero 15. Konkubin', komence rilata al poemo – Parazita afekcio, esprimanta bedaŭron pri superhoma estaĵo?

Vertikale

1. Spektakla entreprenist', ŝajne de sensaca operkanto – Unu peco en maŝinstrukturo, kiu prezentiĝas kvazaŭ du pecoj 2. Ne nur mia, sed ankaŭ ... – Ora monero, kiu ŝajnas valori pli ol unu besto – Fine, ĝi ĉiam detruas vivantulon 3. Fabela fantom', kun inklino al frukto? – Amatino de Zeŭso 4. Bonaj digestoj spite engluton de greka litero – Mallongigo de profunda dormo? 5. Ĝi estas aŭ Blanka aŭ Blua – Mezepoke ĉefkomandi, aŭ krei klaran informon?

6. Havanta unu komponanton – Rifuzi 7. Nordahemisfera arbed' – Neŭtra pronom' – Germana urb' kun menso 8. Duono da rondaĵo – Frukto, preskaŭ arbedo – Alvoko 9. Havenurb', riĉan? – Ne respondeca antaŭ la leĝo – Ĝi senvaloras, se ne estas bonhavo 10. Malnova helena poet' – Favora okaz', al portugala urbo kaj organizo? 11. Spicitaj buletoj kun anglaj bieroj – Kolektiva – Eŭropan' 12. Neĝa dom' – Jam konata ornamita seĝo de ŝtelistego? 13. Rostitaĵ' – Responda ripeta implikaĵo de haroj? 14. Onomatopee altvalora? – Ekzistanta ne en la realo – Litera lud'? 15. Akra monta pinto – Daŭro – Nefakulo, eble pro tio lia scio estas konfuza. Glaŭko (Brazilio)

La solvon de la enigmo sendu antaŭ la 31a de aŭgusto al **MONATO (Enigmoj)**, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

anoncetoj

Por la alsendo de **uzita karto** por aŭtomata pago de telefonalkvoto mi interŝanĝas kun poŝtresta poŝtmarko kun Esperanto-temo. Mi volas pruvi, ke per Esperanto mi povas pli sukcese kolekti internaciskale. R. Verbeke, Vredestraat 66, B-8310 Brugge, Belgio.

Ĉu vi konas mian revon? Mi volus havi en ĉiu lando de la mondo almenaŭ unu samideanon. Interŝ. bk. pm. E-aĵojn. Francisko Horáček, P.K. 132, 635 00 Brno, Ĉeĥio.

38j. fraŭlo dez. kor. edziĝcele kun ĉarmulino en Esperanto (komencanto) aŭ angle. Alain Pallen, Brusselstraat 71, B-2018 Antwerpen, Belgio.

La internacia geedziĝservo INTIMO estas je via dispono. Intimo, p/k 2420, RUS-660075 Krasnojarsk, Rusio.

Konstruistoj! Baldaŭ fondiĝos TAKE, la Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj. Se tia projekto interesas vin, skribu al: TAKE, RN 83 - rue de Tiefenbach, F-68920 Wintzenheim, Francio. Telefono: 89.79.79.92; telekopiilo: 89.79.79.93.

Ni havas sepjaran filinon kaj kvinjaran filon kaj serĉas kontakton al samtipa familio (ne nepre tutesperantista) en suda Anglio. Bonvolu skribi al familio Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien.

Malprudente elspezi aŭ malkomforte tranokti? Se vi preferas la duan, petu la informilon de Gastejo Verda Lumo, 228 Capworth Street, London, GB E10 7HL, taŭga por komerci, por festi aŭ por anomi.

Partoprenu Esperanto-Somerlernejon en Anglio inter la 7a kaj 13a de aŭgusto 1993! Detaloj haveblas de: The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio, ST12 9DG.

La privata komerc-turisma firmao MARAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. **Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj.** Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 Maran Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Denove estas haveblaj kelkaj **Esperantlingvaj telefonkarto** kiuj iĝis tre valora serĉobjekto de kolektantoj. Prezo 360 BEF + afranko. Kvanto limigita. Skribu tuj al la eldonejo!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimume 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.

Monato

renkontos sian legantaron en la ĝiĉeto de Flandra Esperanto-Ligo dum la 78a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio. Profitu tiun idealan okazon por peti informojn, plilongigi vian abonon, konigi viajn dezirojn, ktp.

Esperantisto ? Certe ! Kristano ? Eble.
tiam

DIA REGNO

estas **VIA** revuo.


Mendu provekzempleron ĉe **Leen Hordijk, van Hogendorpstraat 4, NL-3135 CD Vlaardingen, Nederlando.**

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Ideala loko por esperantumi, studadi, feriadu aŭ simple interrompi la vojaĝon por tranokti. Petu nian ĝeneralan programon '93.

KCE, Poŝtako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, ☎ (039) 26 74 07.

LA GAZETO



mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCIO

ESPERANTO-KONFERENCO EN HUNGARIO KONDOROS

17-24 julio 1993



TEMO

Kial paroli Esperanton?

PROGRAMO

*prelegoj, debatoj, kursoj,
Osiek-premio, simpozioj,
teatraĵoj, distroj, libroservo*

*24-27 julio 1993
tri tagoj en Budapeŝto*

*Informoj, aliĝoj:
Eric Laubacher
1, rue des Vosges
F-78180
Montigny-le-Bretonneux
Francio
tel.: (1) 30 96 67 91*

Antverpeno '93

Kultura Ĉefurbo de Eŭropo

SPECIALA ESPERANTO-ĈĈERONADO de la 16a ĝis la 24a de julio

vendredon 16an de julio	Vidbenda filmo pri Antverpeno, en la klubejo de „La Verda Stelo”, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.
sabaton 17an de julio	matene: orientiga promeno tra la urbo posttagmeze: vizito al la retablo-ekspozicio en la renovigita katedralo (enirprezo: 60,- BEF) vespere: gustumi la etoson de la antverpena socia vivo
dimanĉon la 18an de julio	matene: vizito al la presista muzeo „Plantin Moretus” kaj ĉeesto en la „Artista Meso” (11.30 h.) posttagmeze: gvidata vizito al la diamantmuzeo vespere: promeno en la urbo
lundon 19an de julio:	vizito al la antverpena bestoĝardeno (enirprezo 380,- BEF) vespere: kariljonkoncerto
mardon 20an de julio:	ekskurso al Bruĝo (prezo decidota)
merkredon 21an de julio:	matene: vizito al „Rubenshuis”, domo de la fama antverpena pentristo, nun muzeo posttagmeze: vizito al la plenaera muzeo „Middelheim” kun modernaj skulptaĵoj
ĵaŭdon 22an de julio:	ekskurso al Bruselo (prezo decidota)
vendredon 23an de julio:	matene: vizito al „Maagdenhuis” kaj Muzeo Mayer van den Bergh (enirprezo po 50,- BEF) posttagmeze: vizito al la ekspozicio „Antverpeno, la rakonto de metropolo” en „Hessenhuis” (enirprezo: 300.- BEF) vespere: kluba kunveno de „La Verda Stelo” en la klubejo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno (1a etaĝo)
sabaton 24an de julio:	adiaŭo

aliĝkotizo po 100,- BEF tage

Tiu ĉi programo estas nur propono, eblas laŭ propra gusto alternativaj vizitoj aŭ ekskursoj. Flandra Esperanto-Ligo peras pri la loĝado, ĉu en hotelo, ĉu ĉe esperantistoj – antaŭmendu sufiĉe frue ĉar la urbo atendas multajn vizitantojn – renkontu viajn amikojn dum Antverpeno '93 pliajn informojn tel.: + (323) 234 34 00; telefakso: + (323) 233 54 33